



Turka Stelo

La revueto de la turka esperantistaro
 Februaro 2019 n-ro: 38



Merhaba,

Ocak ayının karlı günlerinden merhaba. Bu sayımızda da bu soğuk havalarda evinizde okuyabileceğiniz bir çok metin sunuyoruz size:

- * Türkiye'den bir hikaye çevirisi "Mesut Kim?".
- * Türkiye'den "Mühürlenmiş zaman" köşesinde "Alcatraz Kuşçusu" filmi.
- * Rusya'dan harika bir fabl "Çekirge ile Karınca".
- * Romanya'dan komik bir hikaye "Saygısız köylü kadın".
- * İzlanda'dan Gamli'nin Hollandalılara karşı savaşı.
- * Yunanistan'dan mitoloji, Slovakya'dan mimari, Hırvatistan'dan politik yazılar vs.
- * Bunların dışında dünyanın bir çok ülkesinden yazılar, hikayeler, şiirler, haberler.
- * Ayrıca felsefe, fıkra, bilmece, ve dili öğrenenler için bir köşe.
- * Unutmayın 21 Şubat günü Uluslararası Ana Dil Günüdür.
- * Son olarak, Sevgililer gününüz kutlu olsun!

Hepinize iyi okumalar !


Saluton,

Saluton el la neĝaj tagoj de januaro. En ĉi tiu numero ni prezentas tekstojn por ke vi legu dum tiuj malvarmaj tagoj:

- * El Turkujo tradukaĵo de rakonto "Kiu Feliĉas?".
- * El Turkuo en angulo "Tempo Sigelita" la filmo "La Birdisto de Alcatraz".
- * El Rusio belega fablo "Libelo kaj Formiko".
- * El Rumanio "La maldiskreta kamparanino".
- * El Izlando "La batalo de Gamli kontraŭ la nederlandanoj".
- * El Grekio mitologio, el Slovakio arkitekturo, el Kroatio politiko, ktp.
- * Krom tiuj el multaj aliaj landoj tra la mondo tekstoj, rakontoj, poemoj, novaĵoj.
- * Plue filozofio, ŝercoj, kurcortvotenigo, kaj angulo por la lernantoj de nia lingvo.
- * Ne forgesu ke la 21-a de februaro estas la Internacia Tago de la Gepatra Lingvo.
- * Fine, Feliĉan Valenteno-Tagon!

Bonan legadon al ĉiuj !

SITE DE L'ASSOCIATION DES AMIS DU CDELI



TURKA STELO

Eldonanto : Turka esperantistaro

Redakcio : Vasil Kadifeli - vasilkadifeli (ĉe) gmail (punkto) com

Ĉeflingvo:

Esperanto (+turka)

Kodo:

Li-TUR-06

CDELI: Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia - Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds

Enhavtabelo

Malfermo	1
Enhavtabelo	2
Kursoj	2
Gratulon por la 70-jariĝo de ILEI	2
Tago de la Gepatra Lingvo	2
Esperanto Sumoo	3
UEA	3
TEJO	3
Leteroj de niaj legantoj	4
Anonco de ESF	4
Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA	4
Tempo Sigelita	5
Poemoj de Maria Nazaré Laroca	6
Pensoj en la kelo	6
Nekrologo	7
La bela HELENA (Η ωραία ΕΛΕΝΗ)	8
Eta kristnaska donaco	11
Unua premio de ANEB 2018	11
Pri nia nova reta "Esperanto Vortaro"	12
Kiu Feliĉas?	13
La batalo de farmisto Gamli	14
Arkitekturo sakrala	15
La maldiskreta kamparanino	16
Itala Esperanto-kongreso	16
La domo	17
El la libro de "Dao de Jing" (30)	17
La maljunulo en la frostigita urbo	18
Libelo kaj Formiko	18
Mallonga Historio de Filozofio (37)	19
Floro (4)	20
Tri Fratoj	21
Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018	23
Ŝercoj	24
Kurcvortenigmo	24
La Aŭtunaj Muŝoj (parto 9)	25
Kio sekvas post Kapitalismo	26
La danĝera vojo de "Insight"	27
Kastelo Gresiljono	28
Esperantismo kaj novaj ŝtatoj	29
Ni Lernu Esperanton!	31
Esperantaj vortoj por la 14-a de februaro	31
Facilaj rakontoj	32

Kursoj



Nuntempe okazas nur unu kurso en la lernejo Üsküdar Amerikan Lisesi en Istanbul kun 9 lernantoj kaj kies gvidanto estas Murat Özdizdar.

<https://edukado.net/kursejo?kid=26934>

Gratulon por la 70-jariĝo de ILEI

Feliĉan 70-jariĝon de ILEI !
Prosperan jaron de la 52-a ILEI-kongreso en Ĉaĉak !
13-20 julio 2019

Aliĝilo:

<https://goo.gl/forms/sRJGKyDb3lxnkQYf2>



Radojica Petrovic

Tago de la Gepatra Lingvo

Internacia
TAGO de la
GEPATRA
LINGVO

21-a de
februaro
2019

"Ni devas defendi ...
la indigenajn lingvojn,
pri kiuj ni scias, ke ili
malaperas laŭ la ritmo
de po unu ĉiujn de
semajnojn - kio estas
neriparebla perdo por
la homa heredaĵo."
Direktoro Ĝenerala, UNESCO

Uzante la internacian lingvon, **Esperanto**, ni respektas kaj subtenas lingvan kaj kulturen diversecon en la mondo, en la **Internacia Jaro de Indigenaj Lingvoj**.

Pri Lingvoj: www.lingvo.info Pri interreta komunikado: www.esperanto.net | www.uea.org

Ni atendas leterojn el niaj geamikoj



Nia revueto atendas leterojn el niaj geamikoj!

Ni invitas ĉiujn geamikojn, ambaŭ turkoj kaj fremduloj, skribi kaj sendi al ni siajn opiniojn pri nia revueto, pri Esperanto kaj pri aliaj aferoj kiel memoroj, reĉenzoj de libroj jam legitaj, vojaĝoj, kongresoj, ŝercoj ktp. Ni aperigos ilin en nia revueto. Bonvolu aldoni vian nomon, aĝon, urbon kaj landon. Nia kontakt-adreso estas: vasilkadifeli@gmail.com

La redaktanto ne respondecas pri la subskribitaj aŭ republikigitaj artikoloj.


Esperanto-Sumoo



La 56-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 13-a kaj 27-a de januaro 2019. Sed ankoraŭ ĝiaj

statistikoj ne aperis. Ni publikigos ilin en la venonta numero de Turka Stelo.

La venonta, marta Sumoo okazos inter la 17-a ĝis la 31-a de marto.



Nia retejo:

<http://www.esperanto-sumoo.pl/>

Sumoo en Vikipedio:

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_Esperanto-Sumoo

Fejsbuko:

<https://www.facebook.com/groups/759066970888217/?fref=ts>

fref=ts



UEA



N-ro 773 (2018-12-23)
Rave ekskursi, malmultekoste loĝi kaj favorpreze aliĝi: la 104-a UK en

Lahtio 2019

Tre baldaŭ finiĝos, post la 31-a de decembro 2018, la plej favorpreza aliĝperiodo al la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, okazonta en Lahtio, Finnlando, inter la 20-a kaj 27-a de julio 2019. [...]

N-ro 774 (2018-12-27)

Kondolencoj pro Baldur Ragnarsson (1930-2018)

UEA kondolence informas, ke la veterana esperantisto, fama verkisto kaj poeto, kaj Honora Membro de UEA s-ro Baldur Ragnarsson forpasis la 25-an de decembro 2018 posttagmeze en la kristnaska tago, dumdorme, en maljunulejo en Rejkjaviko, Islando. [...]

N-ro 775 (2018-12-31)

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

La bezono senti nin kune. Unu el miaj antaŭuloj kiel Prezidanto de UEA kutimis priskribi sin kiel "la prezidanto de ĉiuj esperantistoj." La vortoj ŝajnas unuavide pretendemaj. [...]

N-ro 776 (2019-01-15)

Alvoko por la 42-a Esperantologia Konferenco en Lahtio

La organizantoj alvokas ĉiujn fakulojn, sciencistojn kaj aliajn kongresanojn al partopreno en la Esperantologia Konferenco 2019, okazonta en Lahtio, Finnlando, kadre de la 104-a Universala Kongreso de Esperanto, sub la aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj la Centro de Esploro kaj [...]

TEJO



Iĝu Komitatano B de TEJO

Revenis la tempo por kandidatiĝi

kiel Komitatano B de TEJO por la mandato 2018-2020. La elektotoj oficos ĝis majo 2020. Komitatanoj B reprezentas individuajn membrojn de nia organizo en la supera instanco de TEJO: la Komitato.

Ĉiu individua membro de TEJO rajtas elekti sian reprezentanton en la TEJO-Komitato kaj ĉiu individua membro de TEJO rajtas ankaŭ [...]

IJK 2020 okazos en Nederlando

Ni ĝojas anonci ke la IJK 2020 – 76-a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos de la 11-a ĝis la 18-a de julio 2020 en Someren, Nederlando! La eventon organizos NEJ – Nederlanda Esperanto-Junularo.

La organiza teamo, kiu konsistas el 14 homoj (kaj unu koko), jam subskribis la kontrakton kun la IJK-ejo. La loko ofertas ĉirkaŭ 250 litojn kaj multajn lokojn en amasloĝejo kaj tendejo. [...]

Konkurso "Partoprenu IJK-n" 2019

Jam tradicie la fonduso "Partoprenu IJK-n" pretas helpi al membroj de TEJO partopreni la Internacian Junularan Kongreson. La IJK 2019 okazos de la 27-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2019 en Liptovský Hrádok, Slovakio. Dank' al la Fonduso eblas parte kovri vojaĝkostojn laŭ plej malmultekosta maniero (la gajnintoj ricevos ĝis 80% de ĉiuj vojaĝkostoj), la loĝadon en la plej malmultekosta kategorio kaj la programkotizon. La Estraro elektos la gajnintojn dum marto 2019. [...]



Leteroj de niaj legantoj



Kara amiko saluton,
La tutan jaron, mi estas kun via revuo "Turka Stelo". Ĝi plaĉas al mi, ĉar la materialoj estas bone preparitaj kaj kun

perfekta ESPERANTO. Gratulojn!
Mi salutas ĉiujn amike kaj deziras sanon kaj sukcesojn en la Nova Jaro kaj en Esperanto kampo.
Amike
Angel Maglov el Bulgario



Koran dankon por la alsendaĵo, kara amiko!
Gratulon al ĉiuj por la belega decembra revuo Turka Stelo!
Amike,

Maria Nazaré Laroça, el Brazilo



Dankon por la T.S. kaj ankaŭ por la aperigo de la poemoj de Marjorie Boulton
Lenke Szász, el Rumanio

Anonco de ESF

Se vi instruas aŭ instruis en universitato kaj parolas Esperanton, bonvolu plulegi kaj reagi:

* sendu vian nomon, urbon, landon, ret-adreson, fakon pri kiu vi instruas aŭ instruis al la ret-adreso
<esperanto.en.universitatoj@gmail.com>

* se vi, krome, instruas kurson pri Esperanto aŭ pri interlingvistiko en via universitato, informu ankaŭ pri tio.

* se vi deziras finanĉan helpon de ESF por realigi scian esploron pri Esperanto aŭ interlingvistiko, bonvolu rigardu la kriteriojn: **https://**

www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/

* se vi deziras finanĉan helpon de ESF por partopreni scian konferencon aŭ kongreson neesperantistan por prezenti tie referaĵon, bonvolu

rigardu la kriteriojn: **https://www.esperantic.org/eo/stipendioj/esf-stipendioj/**

* se vi ŝatus partopreni la laborojn de reto de universitatoj por internaciigi la universitatan medion per Esperanto, informu ankaŭ pri tio.

Temas pri klopodo intensigi la agadon por Esperanto en universitatoj kunlabore inter ILEI kaj ESF.

Dankon!
ILEI/ESF



Por lingva justeco en multkultura mondo
For linguistic justice in a multicultural world
ekde 1968 | since 1968

Novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA

La bezono senti nin kune

Unu el miaj antaŭuloj kiel Prezidanto de UEA kutimis priskribi sin kiel "la prezidanto de ĉiuj esperantistoj." La vortoj ŝajnas unuavide pretendemaj. Eĉ se oni enkalkulas ĉiujn aligitajn membrojn de UEA (la membrojn de la aliĝintaj landaj asocioj), sendube ili konsistigas nur iun onon de la monda esperantistaro: duonon, kvaronon, okonon, kiu scias? Preter difinaj defioj, pro la disvastiĝo de interreto la lingvo estas pli kaj pli facile lernebla kaj uzebla ekster ajna organiza kadro. Se multiĝas komencantoj kaj progresantoj, kiuj apenaŭ scias, kio estas UEA -- en kiu senco mi estas ilia prezidanto?

Kaj tamen, tamen... mi komprenas mian antaŭulon.

En la regulaj retkunsidoj de la Estraro, ĉiun duan semajnon, ni traktas amason da temoj kiuj tuŝas la vivon de Esperantujo, ne nur en la riĉaj landoj de Eŭropo kaj Norda Ameriko, sed krome kaj eĉ precipe en la "plimulta mondo" -- la landoj, kie loĝas la plej granda parto de la homaro. En tiuj kunsidoj, oni ekhavas pli ĝustan komprenon de la vasteco kaj diverseco de nia tutmonda komunumo. Kaj temas ne nur pri la nunaj esperantistoj. Nia Estraro devas krome


pensi pri la potencialaj esperantistoj -- pri tiuj milionoj da homoj, kiuj ankore estas niaj samideanoj, eĉ se ili ankoraŭ ne trovis sian vojon al la lingvo. Ili ekzistas ĉie, en ĉiuj urboj kaj vilaĝoj de la mondo, kaj ne nur en tiuj lokoj, kiujn ni mem persone konas aŭ konsideras gravaj.

Tiu malfermiteco, tiu zorgo pri ĉiuj homoj, kies korojn tuŝis aŭ povus tuŝi la revo kaj realo de Esperanto -- tio estas kerna vivneceso por asocio, kiu aŭdacas nomi sin universala. Mi estas fiera, ke UEA ekde sia fondo ludas tiun vojmontran rolon. Tiuj samaj valoroj respeguliĝas ekzemple en niaj fondaĵoj, nemalhavebla rimedo por konkrete esprimi solidarecon inter homoj pagipovaj kaj nepagipovaj, inter Nordo kaj Sudo, inter Oriento kaj Okcidento. Miloj kaj miloj da tiaj agoj de reciproka, transkultura aprezo kaj subteno fluas tra niaj kontoj ĉiujare.

Ankaŭ la nova membrisistemo de UEA enkorpiĝas tiujn valorojn. Ĉiu membriĝo de homo el riĉa lando subvencias la malpli koston aliĝon de homo el malpli riĉa lando. Ĉiu membriĝo estas, do, solidara ago. Kiel ajn evoluos la organizaj kaj kulturaj formoj de la Esperanto-movado, mi estas certa, ke restos bezono de tia komuna universala asocio, en kiu ni povas senti

>> 7

Kiel birdo pasigas sian vivon an kaĝo? Ĝi estas nur birdo! Neniu zorgas pri tio. Sufiĉas, ke ĝiaj pepadoj donu plezuron al ĝia posedanto!!! Kaj ankaŭ por tiuj, kiuj vivas libere, malliberulo estas nur



malliberulo. Li faris krimon kaj la juĝejo kondamnis lin. La krimulo pagos sian krimon. La nura diferenco inter kaĝo kaj malliberejo estas, ke kvankam kaĝo estas travidebla, ni ne scias kio okazas malantaŭ la muroj de la malliberejo. Kiel homo pasigas sian tempon en la malliberejo? Kaj se la puno estas dumviva!.. Terura afero! Ĝis la fino de via vivo, vi ne eliros el via ĉelo! Kelkfoje en mia sonĝo – ĉu mi diru koŝmaro? – mi vidas ke mi estas en malliberejo. Mi vekigis ŝvitite. Por vivi post tiuj grizaj muroj sen sufokiĝi, oni bezonas firmecon kaj volon. Jen mi parolos pri iu kiu sukcesis je tio. Robert Stroud. Alivorte la Birdisto de Alcatraz. Mi tuj diru al vi, ke la dumviva malliberulo Stroud, kvankam li portas tiun kromnomon, venigate al Alcatraz maliberejo li ne plu posedis siajn birdojn. Lia interrilato kun la birdoj komenciĝis kaj finiĝis en Leavenworth malliberejo. Tamen teorie ĝi daŭris por ĉiam.

Mi scivolemas, kial mi estis tiel profunde tuŝita pro tia filmo kiun mi spektis dum mia infaneco en la nigra blanka turka ŝtata televidilo TRT? Mi plurfoje demandis tion al mi. Tiu ulo kreis tutan mondon en sia mallarĝa ĉelo. La obstina malliberulo Robert Stroud neniam pensis forfuĝon. Li pie daŭrigis sian malliberan vivon, kiam liaj birdoj malsaniĝis li tagon post tagon lernis pli kaj pli pri la birdoj. Kvankam li ne finis la unuan lernejon, li tiel lernis multajn detalojn pri desegnado, birdoj, leĝo ktp. Kaj tiel li sukcesis fariĝi feliĉa kaj produktema. Tamen ni kiuj vivas subĉiele, kiom da tempo ni perdas vane. Ni kreas niajn proprajn ferkradojn kaj sufokiĝas en la premiteco ni mem kreas. La laŭdinda flanko de la birdisto estas lia nerezignado, lia determinado kaj volo pri vivo. Eble li tiel enŝirmiĝis en la malliberejo, kiel liaj birdoj enŝirmiĝis en la kaĝoj li konstruis. Li estis fidela al sia patrino, sed en la mezo de la filmo pro la ĵaluzaj

kondutoj de ŝi li bruligas ŝian foton kaj li enŝirmiĝas en sia ĉelo kvazaŭ ĝi estas utero. Kontraŭ Henri Charriere, kiu havis la kormnomon "Papilio", Stroud neniam provis eskapi.



Stella Johnson, kiu legis artikolon de la birdisto pri birdoj en birda revuo, sentas simpatian al li, vizitas lin en la malliberejo, ili fariĝas geamikoj kaj komercaj partneroj, kaj malgraŭ la muroj kiuj disigas ilin, ili decidas geedziĝi. Sed la ŝtata punleĝo kiu deŝiris lin de Leavenworth kaj liaj birdoj, ĉi foje devigas lin deŝiri lian vojon kun tiu de lia dua virino, Stella. Li ne permesis, ke la virino ruinigu sian vivon por li.

Kvankam la karaktero de la malliberejestro Harvey, kiun ni spektas dum la tuta filmo, reprezentas la punsistemon, tamen ankaŭ li simpatias la Birdiston de Alcatraz. Li provas protekti lin sed la obstina, ordonon neagonskanta kaj la sentojn ne malkaŝanta Stroud tenas sin malproksime de tio. Eble la plej bela momento en la filmo estas tiam, kiam gvardisto Bull Ransom eksplodas kolere kontraŭ li. Li ne plu povas toleri la krudan kaj arogantan konduton de la birdisto, li volas ke la birdisto konduku al li humane.

Pri kiuj geaktoroj de la filmo mi parolu ĉi tie? Ĉu pri Burt Lancaster en la rolo de la Birdisto de Alcatraz? Ĉu pri tiu Betty Field en la eksterordinara rolo de Stella Johnson, kiu bedaŭrinde forpasis en juna aĝo 57? Ĉu pri Karl Malden en la rolo de malliberejestro Harvey? Ĉu pri Thelma Ritter kiel la patrino? Ĉu pri Telly Savalas kiel Feto? Ĉu pri Neville Brand en la rolo de Bull Ransom?

Oni pli bone komprenas la karakteron Robert Stroud legante la romanon de la filmo. Kvankam insistema en sia leĝa luktado, kial li ne povis esprimi sian amon. Ke li, post malfeliĉa infaneco transiris en adventurema juneco, ke li havis du krom fratinojn kaj unu fraton, ke lia patrino avo estis respektinda juĝisto. Jes la filmon la Birdisto de Alcatraz oni filmis el la samnoma romano de Thomas Eugene Gaddis, kiun li verkis en la jaro 1955. Robert Stroud faris murdon pro sia amikino Kitty, kiun li konis en Alasko – tion en la filmo ni ne vidas – kaj en Leavenworth li faris duan murdon. Pro klopodoj de sia patrino la mortopunon oni anstataŭis kun dumviva mallibereco kaj Stroud pasigis 54 jarojn en malliberejo, de 1909 ĝis 1963 kies plejparto estis en ĉelo. Li nek lernis ŝofori, nek veturis per aviadilo, li nek seksumis post la murdo li faris pro tiu 19 jaraĝa virino en Alasko. Sed li verkis 2 librojn pri birdoj, kaj unu alian libron en kiu li kritikis la malliberejan sistemon en Usono. Li, en tre mallarĝa

Poemoj de Maria Nazaré Laroca

RAPSODIO

Kvinjara knabino
feliĉon balancas
sur ŝnuro ligita
al du arabaj branĉoj.

Sed ŝi ne suspektas
pri nepra ŝnurego:
kvindekjara ino,
pont' super abismo.

La knabino feliĉas
pro la momento pura;
tamen ŝi malkonfidis
al l' abismo el plumoj.

Kaj ŝi teksas kaj malteksas
la silkon de l' temprivero,
kiu eterne revenas...

La virino kvindekjara
la vivspegulon transiras,
kaj kun kaos' dialogas.

Sed ŝi nur sukcesas trinki
de l' tago l' okulon bluan,
sub la printempa suno...

SIMPLECO

La poeto paŝtas sungutojn
en ĉi vintra mateno,
kaj pelas ribelemajn ideon
sentojn serĉantajn.

Tiam lin surprizas Dio
per la nobleco de etetaj
floretoj blankaj,
kiuj ornamas la polvon
indiferentan de l' forlasita
trotuaro.

VINTRO

La doloro frostigis
mian septembron
iam tiel rozkoloran...

Senkoloraj tagoj lamentas,
kaj fluas tra l' fenestro,
kiu min rigardi permesas
la nun malproksiman placon,
kiel nigra-blanka filmo.

Sed l' anĝelo de l' espero,
el la paĝoj de l' Evangelio,
responde al larmoj kaj preĝoj,
indulgema kantis al oretoj niaj:
"Ĝojegu, karulino!"
Ne malfruos printempo!

ESTU LUMO!

Heredantoj de l' Lumo,
jen ni feliĉaj, tamen,
dancantaj en la mallumo
de nia malsaĝeco.

Ni avidas je l' ombro
vanta de l' aplaŭdoj

nutranta la famon,
kiu nin trompas,
kaj forpasas.

Lumiĝi bezonas
la senmova animo,
dum estas tempo:
ĉar nur la lumo
ne korupteblas!

AL BALDUR RAGNARSSON

Poezio funebras,
versoj ploras: forpasis -
Ho ve! - Baldur Ragnarsson,
la Poeto plej elstara
el nia verda mondo.

Tamen Parnas' gaje festas!
Poetoj mortos neniam:
ili restas ensorĉitaj,
kiel porĉiamaj steloj
en la memoro de l'tempo.

verkis **Maria Nazaré Laroca** el Brazilo



Fonto: <http://nazarelaroca.blogspot.com/>

Pensoj en la kelo

tradukis **Gabányi Zoltán**, el Hungario

La pilko falis tra la rompita fenestro en la koridoro de la kelo.
Unu el la infanoj, la dekjara filino de la dommaŝtro, trenpaŝis por ĝi. Tramo iam detranĉis
duonon de la kruro de la malfeliĉulino, kaj ŝi tre ŝatis portadi la pilkon por la aliaj.

En la kelo krepuskis, sed ŝi rimarkis, ke io moviĝas en angulo.

– Katinjo! – diris la dommaŝtra filino kun ligna kruro. – Kiel vi venis ĉi tien, mia katinjo?

Ŝi kaptis la pilkon kaj kiel rapide ŝi povis, foriris kun ĝi.

La maljuna, malbela kaj fetora rato – ja ĝi ŝajnis al ŝi kato – miregis. Ĝis tiam neniu parolis al ĝi tiamaniere.

Oni nur malamamis ĝin, oni ĵetadis karbopecojn al ĝi, aŭ fuĝis de ĝi en teruro. La unuan fojon ĝi pensis pri tio,
kiel malsame estus, se ĝi naskiĝus kato. Eĉ – ĉar oni estas tiel tropostulema – ĝi tuj foranimadis plu. Kiel
estus, se ĝi estus naskiĝinta dommaŝtra filino kun ligna kruro?

Sed tio estis jam tro bela. Ĝi eĉ ne povis tion imagi.



rakonteto de **István Örkény**, el Hungario
tradukis **Gabányi Zoltán**, el Hungario

Nekrologo

Forpasis BALDUR RAGNARSSON



Ni kun malĝojo informas vin ke la 25an de decembro post longa malsano forpasis Baldur Ragnarsson. Baldur naskiĝis en la jaro 1930, en Islando. Estis diplomito pri islanda kaj angla lingvoj, gimnazia kaj universitata instruisto. Li estris reviziadon de la

instruado de la islanda sur la baza kaj meza niveloj, laboris kiel lerneja ĉefinspektoro. Verkis islandlingve poemlibrojn kaj fakajn librojn pri la islanda lingvo. Membro de Verkista Asocio de Islando. Lernis Esperanton kiel gimnaziano en 1949. Aktivis movade ekde 1952. Prezidanto de Islanda Esperanto-Asocio dum multaj jaroj. Prezidanto de la Belartaj Konkursoj de UEA 1975-85. Akademiano ekde 1979. Estrarano de UEA pri kulturo kaj eduko 1980-86. Vicprezidanto de UEA 1980-83. LKK-prezidanto de la Rejkjavika UK (1977). Redakciano de Norda Prismo 1958-1974. Verkisto en Esperanto ekde la kvindekaj jaroj. Multe tradukis el la islanda lingvo. Ekde 2006 kandidato por la Nobelpremio por literaturo, nomumita de Akademio Literatura de Esperanto.

Fonto: <https://edukado.net/novajhoj?id=777>

5 >>

ejo, unue per siaj birdoj, poste per sia legado, kreas riĉan mondon.

Kiam li estis 61 jaraĝa, li provis memmortigi sin. Kontraŭ lia imago en la filmo, li falis en malesperon. Tamen li teniĝis al vivo ĝis la fino.

Estas libro nomita "La multaj vizaĝoj de Robert F.Stroud" (The many faces of Robert F.Stroud). Verkita de Jolene Babyak, la filino de iu gardisto en la maliberejo. Mi ne legis ĝin sed laŭ la komentoj en la interreto oni komprenas, ke li fakte havis kontrastan karakteron al tiu, kiun kreis Holivudo en la filmo. Seniluziigo! Sed mi volas teniĝi en lia karaktero en la filmo. Ni multfoje grublmas pri tre simplaj aferoj okazantaj ekster la malliberejo, sed tra tiu mondo

4 >>

nin kune – asocio kiu ebligas al ĉiuj homoj, per la simpla pago de kotizo, esprimi sian kredon je la nuno kaj estonteco de Esperanto.

Tial, sojle de nova jaro, mi invitas ĉiujn legantojn de ĉi tiu mesaĝo aliĝi al UEA, montrante tiel fidon al nia komuna forto. Kaj samtempe mi sendas bondezirojn ne nur al niaj aktualaj membroj, sed al ĉiuj homoj, kies vivon lumigas la lingvo de Zamenhof. Viaj zorgoj estas niaj zorgoj; viaj aspiroj estas niaj aspiroj.

Forpasis GINETTE MARTIN

Venis al la redakcio la tristiga mesaĝo pri la forpaso de elstara franca Esperanto-instruisto kaj tradukisto, aktiva membro kaj kontribuinto ankaŭ al nia retejo edukado.net.

La 3an de decembro forpasis en sia 80-a jaraĝo Ginette Martin. Ŝi

havis multajn meritojn pri Esperanto, ŝi klopodadis varbi kaj instrui la lingvon en sia ĉirkaŭaĵo. Sed ŝi kuraĝe entreprenis ankaŭ la tradukadon de esperantaj verkoj por konigi ilin al la franclingva publiko: La Zamenhof-strato (La rue Zamenhof), Kroata milita noktlibro (Journal de nuit), Comme un vol d'oiseaux sacrés (Flugi kun kakatuoj), La ŝtona urbo (La ville de pierre)... kaj lastatempe ŝi estis okupata pri la traduko de la raportoj de HORI Jasuo pri Fukuŝima kaj la sekvoj. Ŝia forpaso estas granda perdo por ni ĉiuj.

Fonto: <https://edukado.net/novajhoj?id=773>

PS. Ginette Martin estis ankaŭ kontribuantino de Turka Stelo revuo



pasis homo kiu restis en malliberejo dum pli ol unu duono de jarcento. Homo pensas, ke se tio, kion ni nomas sorto ja ekzistas, kia kruela ĝi povas esti!

Kino por mi samtempe estas kunsido por alvoki animojn. Kiam vi spektas filmon, vi alvokas la animojn de la karakteroj en la filmo kaj ankaŭ la animojn de tiuj roluloj kiuj jam forpasis el tiu mondo. Filmo estas sigelita tempo, sekcio de vivo, kiu daŭras poreterne. Ĉu ĝi estas tiel? Ne haltu! Eku! Alvoku animojn!

verkis kaj sendis **Konuralp Sunal** el Turkujo
redaktis **Vasil Kadifeli** el Turkujo

* *Esperante "Alktaraz"*

Kiel via Prezidanto, mi laboras kun niaj estraranoj kaj komitatanoj, niaj ĉefdelegitoj kaj komisiitoj, niaj mecenatoj kaj honoraj membroj, por kunkonstrui tian mondan asocion, kiun ni ĉiuj meritas kaj bezonas.

Mi deziras entuziasman, amikecan, kaj solidarecan jaron 2019 al ĉiuj esperantistoj!

Mark Fettes
Prezidanto de UEA

Kio estas virino? Jen demando unuaaŭde naiva, tamen postmedite tre serioza, ne facila, permesanta multajn, diversajn respondojn. Pri tiu afero estis skribitaj multaj centmiloj da paĝoj, tamen povas tuŝi min nur laŭdoj al la virinoj, ĉar mi adoras ilin, ĉar mi kredas, ke ĉio bona, agrabla, utila, bela en la homa vivo estas ina! Mi, ja, scias, ke miaj propraj opinioj interesas neniun, tamen mi devis iamaniere ekiri, ĉar mi intencas rakonti pri la plej bela, sed ankaŭ plej fatala virino de ĉiuj epokoj. Nu, mi deziras prezenti Helenan, la plej belan mortemulinon kiu aperis en nia mondo, pri Helena, kiu estas konata kun la alnomo "bela", do, mi parolos pri la bela Helena!



Ŝi estis reĝidino, unu el la filinoj de la granda helena heroo, reĝo de Sparto (Σπάρτη), Tindareo (Τινδάρεως). En la efektiveco ŝi estis filino de la granda dio, Zeŭso (Ζεὺς), la reĝo de la tuta mondo, kiu, laŭ sia

kutimo, iun nokton, sub formo de cigno, enŝteliĝis en la dormoĉambron de la bela reĝino Leda (Λήδα), li iamaniere kuniĝis kun ŝi kaj ŝin gravedigis. Tio estis konata nur al la dioj kaj supozeble al Tindareo mem, kiu verŝajne povis rekoni la fruktojn de sia propra aktiveco. Cetere, la eksterordinara, la dideca beleco de Helena atestadis ties veran devenon. Mi diras tion, ĉar la beleco de Helena superis la homajn mezurojn, ĝi atingis la dian nivelon. Ŝajnas, tamen, ke estis ne nur beleco de la vizaĝo, de la mieno, de la korpo, de la staturato, de la teniĝo, de la moviĝo, estis ĉio tio ĉi, sed io ankoraŭ pli forta, estis ia elradiado de nepriskribebbla altir-forto, kiu, mirinde, efikis sur ĉiujn virojn, kaj virinojn.

Ekde kiam Helena estis knabino, la famo de ŝia unika beleco estis disvastigita en la tuta helena kaj proksima barbara mondo. Tio kaŭzis la scivolemon de la granda heroo Tezeo (Θησεύς), la reĝo de Ateno (Αθήναι), kiu, moviĝite de senbrida junula entuziasmo kaj flameco, senpripense organizis fulman sturmon kaj forrabis Helenan, kiam ŝi estis 14jara knabino. Tio estis vere junula petolaĵo de Tezeo, kiu, ne havante alian intereson aŭ celon, lasis la knabinon al la prizorgo de sia patrino kaj tuj foriris al milita ekspedicio. Tiel, kiam Dioskuroj (Διόσκουροι), la fratoj

de Helena, same fulme kaj neatendite invadis Atenon, renkontis tre malfortan reziston, kaj facile ili prenis sian fratinnon kaj revenis al Sparto, Tio estis ja feliĉa fino, ĉar ĝi havis neniajn malagrablajn sekvojn por la protagonistoj kaj por la tuta Helenujo.



Ne estis postsekvoj, tamen tiu historio kaŭzis la maltrankvilon de Tindareo, kiu sciis bone ke la beleco de lia filino kaŝis neantaŭvideblajn danĝerojn. Do, li metis la junulinon sub sendorma gardado kaj post nelonge li komencis pensi pri ties edzinigo.

Post kelkaj jaroj, kiam Tindareo opiniis ke estis veninta la ĝusta tempo, per heroldoj senditaj al la tuta helena lando, deklaris sian decidon edzinigi sian filinnon kaj invitis ĉiujn interesiĝantajn helenajn suverenojn viziti Sparton kaj meti sub lia juĝo sian kandidatecon. La difinitan daton, la sparta reĝa palaco pleniĝis de tre valoraj donacoj. Dekoj da reĝoj, reĝidoj, militestroj, ĉiuj riĉaj, fortaj, distingindaj regnestroj, preskaŭ ĉiuj needziĝintaj junaj helenaj estroj kolektiĝis en Sparto. Estis ne nur la disvastigita renomo de la juna reĝidino pro sia sen-egala beleco, estis ankaŭ la admiro, la profunda estimo kaj respekto al Tindareo, unu el la plej noblaj, plej gloraj herooj de lia generacio, kun kiu ĉiu helena altranga viro deziris parenĉiĝi. Tindareo bonakceptis, fervore, reĝdece gastigis kaj prizorgis ĉiujn siajn vizitantojn, longe li diskutis aparte kun ĉiu el ili kaj, fine, invitis ĉiujn en komunan kunvenon, por anonci sian decidon. Kiam ĉiuj kolektiĝis, Tindareo petis, ke ili ĉiuj promesu per ĵuro, ke ili akceptos senhezite kaj bonvole lian decidon. Ĉiuj fervore obeis, sed tio ne sufiĉis al Tindareo, kiu ankaŭ postulis de la ĉeestantaj helenaj regnestroj, kunĵuri per sia honoro, ke ili tute volonte, amike, kamarade oferos sian subtenon, helpon kaj kunlaboron al lia elektito, ĉiam ajn tiu lasta bezonos kaj petos tion. Ĉiuj kunĵuris senproteste kaj nur tiam Tindareo anoncis, ke li elektis kiel sian bofilon Menelaon (Μενέλαος), la pli junan fraton de la potenca reĝo de Argo (Αργος), Agamemnono (Αγαμέμνων). Ankaŭ tiu Agamemnono estis bofilo de Tindareo, edzo de lia pli aĝa filino Klitemnestra (Κλυταιμνήστρα). La maljuna reĝo, kies solaj ĝemelaj filoj estis antaŭ nelonge mortintaj, bezonis ne nur edzon por sia filino sed ankaŭ heredanton de sia trono, kaj li bone sciis, ke per sia elekto, li lasis la sorton, ne nur de sia filino, sed de sia reĝlando, en manoj taŭgaj, kapablaj kaj tute certaj. Tiele, la juna Menelao iĝis edzo de Helena kaj reĝo de Sparto.

Helena estis bonsorta, ŝi estis, almenaŭ ŝi devus



esti, feliĉa, ĉar ŝia edzo estis viro bela, bonkora kaj afabla, li apartenis al gento nobla kaj li estis tre riĉa kaj brava, kaj militisto forta, lerta, sentima. Li posedis ĉion, kion edzino povus deziri,

tamen, mi ne estas certa, ke ĉio tio ĉi sufiĉis al Helena. Kompreneble mi ne scias la sekretojn de la geedza dormoĉambro, tamen ŝajnas, ke Menelao, viro batalema, iom kruda, afabla sed ne tenera, ne karesema aŭ galanta, estis plej probable perforta amoranto. Viro je ĉio avida, kiu el ĉio li deziris preni multon, kredeble estis same avida por sia tiom bela, freŝa kaj ĉarma edzino. Kompreneble, ĉio tio ĉi estas pensoj arbitraj, naskitaj post la teruraj okazaĵoj kiuj sekvis la unuajn feliĉajn jarojn de la reĝa paro. Helena estis tre juna kiam ŝi edziniĝis kaj kiam ŝi akiris sian filinon Hermionan (Ερμιόνη). La familio estis jam kompleta, ĉio en la palaco kaj en la tuta lando fluis glate, pace, trankvile.

Tio, ĝis kiam kellokaj fremdaj ŝipoj atingis Sparton. Estis vizitantoj el la mal-proksima, potenca kaj riĉa regno Trojo (Τροία) kaj, pli konkrete, estis unu el la reĝidoj de tiu lando, la juna kaj tre bela Pariso (Πάρις) kun malmultenombra sekvantaro. La juna reĝido, dezirante koni la mondon, entreprenis longan ŝipveturadon al diversaj lokoj kaj landoj. Menelao, fidela al la kutimoj de sia gento kaj patrujo, bonakceptis la altan vizitanton kaj oferis al li malavaran gastigadon. En la palaco estis organizitaj festoj kaj ceremonioj honore al la fremduloj, sed post nelonge atingis Menelaon malagrabra novaĵo pri la morto de lia avo en Kreto (Κρήτη). Li devis tuj foriri por oficiale partopreni la sepulton, do, li haste foriris, lasinte la prizorgadon de la vizitantoj al sia edzino. Ĉu ĉio okazis post la foriro de Menelao? Ĉu ĉio estis de antaŭe farita kaj preparita? Neniu scias. La fakto estas, ke Helena, fulme kaj flame enamiĝinte al la fremda reĝido, tuj forgesis sian devenon, devon, honoron, ĉion ŝi forgesis, ŝi lasis sin senhezite en la manojn de la bela Pariso, ŝi forlasis sian edzon, sian familion, sian patrujon, sian reputacion, ŝi enŝipiĝis kaj foriris kun sia amoranto!

La konduto de Helena estis skandala, senhonoriga, ne pardonebla, tamen la faro de Pariso,

reĝido, nu, reprezentanto de fremda regno, estis netolerebla ofendo. Estis ne nur provoko kaj ofendo kontraŭ Sparto kaj Menelao, sed kontraŭ la tuta Helenujo. La malnova kunĵurado, tiu kunligo de la helenaj regnestroj per komuna ĵuro ekfunkciis. La iniciaton kaj estrecon prenis sur sin la plej potenca helena estro, Agamemnono, kiu invitis ĉiujn helenajn reĝojn, observi sian ĵuron kaj partopreni komunan militiron kontraŭ la ofendintojn de la patrujo, de la tuta helena mondo. Ĉiuj volonte alkonformiĝis al la peto de Agamemnono kaj post nelonge dekoj da armeoj kaj flotoj, multaj miloj da batalantoj, komencis la preparadon de la plej granda militekspedicio de ĉiuj epokoj.

Tiele eksplodis la granda milito de Helenujo kontraŭ Trojo, la plej granda, longa kaj kruela milito, en kiu falis miloj da bravaj, kuraĝaj kaj noblaj viroj. Unu tre granda, potenca kaj prospera regno tute detruigis, malaperis; multaj ankoraŭ pli malgrandaj regnoj renversiĝis, estis totala katastrofo, vera kataklismo, kaj kaŭzo de ĉio tio ĉi estis la fatala virino, estis la bela Helena. Ŝi pensis pri nenio, ŝi ne povis pensi, ŝi ne povis kompreni, ne povis koncepti kiaj povus esti la sekvoj de ŝiaj agoj. Ŝi nur deziris ĝui la karesojn, la kisojn, la amoron de Pariso, nur tion ŝi deziris. Ŝia partnero, same allogita, dronadis en la admiro kaj adoro, en sia neretenebla pasio al la tiom bela amorantino, li tute ne suspektis kiajn terurajn rezultojn povus havi la senpripensa lia ago. Foririnte de Sparto, la feliĉaj geadultuloj distr-cele vagadis longe, vizitante diversajn landojn, Egiptujon, Cipron kaj aliajn kaj kiam ili atingis Trojon, la informoj pri la ekiro de la helenaj flotoj estis jam ricevitaj kaj la tuta lando vivis en la febro de la preparado por la defensiva organizado. Oni tre facile povas supozi kia akcepto atendis Parison kaj Helenan. En la reĝa palaco regis nur maltrankvilo, necerteco, timo, malakordo. La multenombra reĝa familio estis dividita en partiojn, kelkaj opiniis, ke ili devas liveri la malĉastan adultulinon, aliaj eĉ Parison estis pretaj liveri al la ofendita helena reĝo, la pli multaj, do, deziris ĉiarimede eviti la militan kolizion. Fine, intervenis la maljuna, saĝa reĝo Priamo (Πρίαμος). Li severe ĉesigis la konfliktojn, la tumulton, li aŭskultis atente la opiniojn kaj proponojn de ĉiuj siaj filoj kaj proksimaj parencoj, de la altranguloj kaj armeestroj kaj fine, en aparta sia konsiliĝo kun nur sia plej aĝa filo, la mondkonata heroo Hektoro (Εκτωρ), estro kaj komandanto de la tuta troja militistaro, li decidis, fiere alfronti la malamikojn, kontraŭstari al la fremda atako kaj defendi la dignon kaj fierecon de sia nacio. Helena estis akceptita kiel edzino de Pariso, ŝi lokiĝis en la apartamentoj de la reĝido, sia edzo, kaj iom-post-



iome, dank' al sia nevenkebla altir-forto, komencis gajni la simpation kaj toleremon de la reĝaj familianoj kaj nobeloj. Ĉiuj viroj estis

kaŝe enamiĝintaj al ŝi, ĉiuj virinoj kaŝe ŝin ĵaluzis, tamen, neniu povis kontraŭstari al ŝia ĉarmo, ĉiuj, kun diversaj sentoj, fine ŝin akceptis.

Kaj la Helenoj alvenis, la milito komenciĝis, kaj estis milito sovaĝa, estis milito longa, dekjara, kun ĉiutagaj kruelaj bataloj, en kiuj falis, la unu post la alia, grandaj herooj de ambaŭ flankoj. Helenan atingis informoj pri ĉio, tiele ŝi sciis, ke Menelao estis unu el la plej sentimaj kaj fortaj batalantoj, kiu partoprenis ĉiujn plej mortigitajn batalojn. Tamen, nur unufoje li sukcesis troviĝi sur la batalkampoj fronte al Pariso kaj tiam furioze li sin ĵetis kontraŭ sian grandan malamikon, sed kiam ties fino estis tute certa, la lastan momenton, mirakla interveno de la diino Afrodita (Αφροδίτη) savis la junan reĝidon. Ĉiuj sciis, ke Pariso estis nek tre kapabla, nek temerara batalanto kiel la pli multaj el siaj fratoj. Li preferis la dolĉecon kaj sekurecon de sia dormoĉambro ol la batalterenon kaj kiam li ne povis ĝin eviti, li bataladis de malproksime per la arko, li evitis la koliziojn. Tamen, venis la fatala tago, kiam, troviĝinte vid-al-vide al Filokteto (Φιλοκτήτης), la reĝo de Magnezio (Μαγνησία) kaj unu el la plej bonaj helenaj arkistoj, Pariso ne povis eviti ties seneraran sagon. Tiele, de malproksime, tute senglore estis mortigita la edzo de Helena. Priamo perdis unu ankoraŭ sian filon kaj Helena perdis sian edzon, ŝi iĝis vidvino. Tamen, la maljuna reĝo, kiu sciis ke en tiuj krizaj momentoj li devas nepre konservi pacon kaj konkordon en sia familio kaj palaco, ne lasis Helenan longe funebri, li haste edzinigis ŝin kun sia filo Deifobo (Δηίφοβος). La dua troja edzo de Helena estis tute diferenca al Pariso. Li estis viro serioza, severa, ne delikata, ne bonhumora kaj sangvina kiel Pariso. Krome, li estis temerara militisto, la dua post Hektoro plej kapabla, forta kaj sentima troja batalanto.

Malfeliĉe, post nelonge ankaŭ la granda Hektoro falis kaj ekde tiam ĉio estis antaŭskribita, ĉio estis perdita. En Trojo la tempo lante fluadis en etoso de daŭra maltrankvilo, timo kaj funebro. Kaj venis la lasta punkto, la lasta akto de la granda dramo. La malamikoj

eniris en la ĉefurbon, la masakro komenciĝis, la unuaj flamoj levigis, la unuaj malamikoj atingis la palacon, ili faligis la pordegon, ili ekokupis la reĝajn apartamentojn, la sango de la lastaj rezistantoj fluadis abunde! Malantaŭ la peza pordo de sia apartamento, Deifobo, plenarmita, akompanata de siaj plej proksimaj kunuloj, atendis la destinon, la morton, preta ĝismorte batali kaj honore fali.

La pordo malfermiĝis kun bruo kaj post ĝi staris viro sangoplena, sovaĝa, kun aspekto terura, kun okuloj flamantaj, kun spirado laŭta, kun armiloj pezaj. Tie staris Menelao! Per nur unu gesto li ordonis siajn sekvantojn detiriĝi, li staris sola antaŭ la lastaj siaj kontraŭuloj kaj tuj poste, kiel neretenebla, furioza brutalo, sin ĵetis sur ilin! Sekvis batalo kruela, feroca, senbride perforta, sed ne daŭra. Menelao preterpasis la falintajn korpojn de siaj kontraŭuloj, li ne sentis la doloron de siaj novaj vundoj, li ne aŭdis la vivojn de siaj kunuloj, li komprenis nenion, li nur rigardis avide la duan pordon de la salono.

Per la unua lia forta ekpuŝo, la pordo malfermiĝis, kaj, jes, en la centro de la dua salono staris ŝi, staris Helena, en pozo atenda, en teniĝo fiera. Ŝi estis, strange, kvazaŭ transmonde lumata de multaj, disaj olelampoj, ŝi portis nur araneaĵecan, travidan noktorobon, ŝi estis nepriskribebla, die bela, pli bela ol ĉiam antaŭe. Menelao levis la sangomakulitan pezan glavon kaj Helena, kun mieno rideta, kun okuloj brilantaj ektiris, malfermis sian robon, ŝi antaŭentenis sian nudan bruston, siajn neimageble belajn mamojn, ŝi restis tute senmova, preta akcepti la mortigan baton.

Estis tempo de nur unu elspiro, de nur unu korbato, estis tamen tempo sufiĉa. La brako de Menelao malleviĝis, la glavo falis, la sovaĝa militisto kovris la duonnudan, gracian, amatan korpon de Helena per sia sangomakulita kruda mantelo, li levis sin en siaj brakoj kaj kurante foriris al siaj ŝipoj!

Jes, tio estas ĉio. La virino ankoraŭfoje triumfe venkis!

Mi rakontis nur la interesan parton de la vivo de Helena. Sekvis ankoraŭ multo, la aventura reveno de la geedzoj al la patrujo, la longa, harmonia, plena je reciproka amo, tenero, fido kaj fideleco, komuna vivo, tamen ĉio tio ĉi estas afero rutina, interesas nek min nek la legantojn. Oni, tamen, permesu al mi teni la finan konkludon, ke la virina ĉarmo estas la plej granda forto en nia mondo!

verkis **Spiros Sarafian**, el Grekujo

Fonto: “**GEMOJ EL LA HELENA MITOLOGIA KAJ HISTORIA TREZORO**”

Eta kristnaska donaco

verkis Paulo Sergio Viana, el Brazilo

Roza estas negrino kaj ne havas siajn frontajn dentojn. Ŝia buŝo estas ĉiam malfermita kaj plena de salivo, pro la medikamentoj, kiujn ŝi englutas, kontraŭ skizofrenio. Ŝi moviĝas malrapide, parolas milde kaj malmulte, ŝia rigardo estas senesprima. Ŝi iradas en la koridoroj de la maljunulejo, ĉiam kun la kapo turnita malsupren, kvazaŭ ŝi profunde meditus, aŭ kvazaŭ ŝi serĉus iun objekton, kiu falis el ŝia mano. Sed Roza nenion posedas, kiu povus fali. Ŝi surhavas vestojn donacitajn, uzitajn, sandalojn el kaŭĉuko trivitajn kaj koloran bracelecton el kaŭĉuko, pri kiu ŝi multe fieras.

Roza loĝas en maljunulejo por malriĉaj homoj, de jaroj. El tie ŝi eliras nur por sangekzamenoj, unufoje en ĉiu jaro. La ceteran tempon ŝi iradas laŭ la koridoroj aŭ rigardas malnovan televidaparaton kun malklara ekrano kaj sibilanta sono. Dum la lastaj jaroj, Rosa frekventas lecionojn por alfabetigo, kiujn simpatia juna volontulino proponas, unufoje en ĉiu semajno. Ŝi zorgeme kopias literojn kaj ciferojn sur donacita kajero, el kiu, evidente, oni forprenis skribitajn foliojn, lasante ankoraŭ kelkajn neskribitajn. Roza jam lerte konas la numerojn de 1 ĝis 10. Ĉiusemajne alvenas kuracisto. Li parolas al kelkaj maljunuloj, ekzamenas kelkajn el ili, skribas paperojn, donas instrukciojn. Li ĉiam interŝanĝas kelkajn vortojn kun Roza, simpatie. Tiun tagon, Roza sin pretigas, surmetas koloran bluzon kaj la sandalojn uzatajn por iri surstrate. Kaj ŝi montras al la doktoro sian semajnan lecionon, el la alfabetiga kurso. Li ĉiam laŭdas:

- Via skribo estas bela, Roza!
Gratulon!

Hodiaŭ, ĉar mankas malmultaj tagoj ĝis la Kristnasko, Roza prenis al si kuraĝon. Kiam ŝi adiaŭis la kuraciston, ŝi mallaŭte diris:

- Mi volus gajni brakhorloĝon, en la Kristnasko...
Kiu montras la horon per ciferoj, sur ekraneto.

La kuracisto ekmiris.

- Horloĝon, Roza? Ĉu vi scipovas rigardi la horon?
- Mi volas lerni...

Li pensis dum momento. Poste li denove demandis:

- Kaj por kio vi volas scii, kioma horo estas, Roza?
Nun estis ŝi, kiu pensis. Fine, honteme, ŝi klarigis:
- Unu tagon, la instruistino diris, ke la tempo nun pasas tre rapide. Mi ne komprenis tion. Mi ne povas kompreni, kio estas pasanta tempo. Ŝi diris, ke sufiĉas rigardi horloĝon, kaj mi komprenos. Nun mi pensas pri tio tagnokte. Se mi havus horloĝon...

Roza interrompis la klarigon kun timema rideto.

La sekvan tagon, la doktoro alportis ciferecan brakhorloĝon, fiksitis ĝin al la maldekstra brako de Roza.

- Poste vi diru al mi, Roza, ĉu efektive la tempo pasas, aŭ ĉu temas pri blago. Feliĉan Kristnaskon!

verkis Paulo Sergio Viana, el Brazilo

Fonto: <https://>

blogdopaulosergioviana.blogspot.com/2018/12/pequeno-conto-de-natal.html



Unua premio de ANEB 2018

poemoj de Elena Popova, el Bulgario

MISTERA LUNO

Jen trinkas
de la maro,
jen ĉion redonas
sen avaro.
Ĝi similas
aŭ al pilko hela,
mistere rideta,
aŭ al arko,
rikolti preta.
Iam per arĝentaj
ŝuoj sin vestas
kaj festas
sur la ĉielo.
Tiam muzikas
la orkestro stela
por la lun' mistera.

KIEL AROMAS NIA TERGLOBO

Kiel aromas fojno falĉita, kiel
odoras! ...
Tiom da herboj amasigitaj
eligas spiriton.
Aŭdu l' amon prikantas la griloj
por revemuloj
kaj la steloj invitas animojn
al vastoj senlimaj...
Nia terglobo kiel aromas!...
Kiel parolas sendorma!...

*** Unua premio en konkurso de ANEB 2018 - Asocio de la nevidantaj Esperantistoj en Bulgario.

GUTOJ DA SANO

En luliloj de folioj
miloj da gutetoj
dormas sorĉate
de naturaj sekretoj.
Vekas ilin l' aŭroro:
- Tempo estas por laboro!
De malsekaj branĉetoj
alteriĝas rosgutetoj,
kantas kaj petas:
- Venu vi nudpiede,
paŝu kaj al ni kredu -
sanon ni donacas!

verkis Elena Popova el Bulgario



La turkaj esperantistoj nun posedas novan "Esperanto-Turka" vortaron. Nia samideano Ege Madra pere de siaj propraj program-klopodoj realigis aplikaĵon pri nova kaj moderna vortaro. La enhavo de la vortaro estas simpla sed oni povas taksu ĝin kiel la plej ampleksa vortaro kreita ĝis nun ¹. La amplekso de nia vortaro kompare kun la ankaŭ reta PIV vortaro ² estas limigita sed ĝi provizas la eblecon esti plibonigita. La vortaro nun enhavas ĉirkaŭ 6,000 vortoj. Tiuj 6,000 vortoj povas venigi la turkan lernanton al sufiĉe alta nivelo. Post tiu punkto la lernanto povas uzi la retan vortaron de PIV. Tamen, kiam ni plenigos kaj riĉigos la Tr->Eo parton, tiam la turka esperantisto fariĝos kapabla fari bonkvalitajn tradukaĵojn al Esperanto. Ĉi tiu estas tasko kiu ankoraŭ atendas laboron.

Kelkaj ecoj de nia vortaro estas la jenaj.

El la vidpunkto de la normala uzanto:

- 1) La vortaro funkcias aambaŭdirekte, kaj Eo->Tr kaj Tr->Eo. Nuntempe la Tr->Eo flanko estas preskaŭ malplena kaj pro tio oni devas fari aldonan laboron.
- 2) Enirante literojn por serĉi vorton la vortaro montras vortojn, kiuj komencas per tiuj literoj kaj la uzanto povas elekti el ili.
- 3) La elektita vorto estas montrita sur la ekrano kune kun la aliaj vortoj rilataj al la sama radiko. La elektita vorto kaj ĝia signifo estas montrita sur verda fono.
- 4) La verboj ankaŭ havas la transitivan / netransitivan karakteron en la signifo.
- 5) "Legasistanto" estas funkcio, kiu ebligas la lernanton kopii kaj alglui en ĝi tekston kaj tiam la teksto estas transformita en tia formo ke klakanta sur iu ajn vorton, ties signifo estas montrita sur la ekrano. Do ne estas bezono trafolumi vortaron por kompreni la tekston.

El la vidpunkto de la vortaro-redaktistoj:

- 1) Oni uzas paskodon por eniri en tiu parto.
- 2) La 40 lastaj ĝustigoj en la vortaro estas detale kaj otomate videblaj.
- 3) Uzante la eblecon de "Detala Serĉo" oni povas spekti kiu, kion, kaj kiam enigis vortojn en la vortaro kaj tiel detekti mankojn kaj malĝustajn punktojn en la vortaro.
- 4) Oni povas rekte kaj rapide enigi vortojn per la "Nova Vorto" ekrano. Kompostante la tekston oni povas ankaŭ atingi la signifon en vortaro PIV.
- 5) La ekrano "Enigi Tekston" provizas la eblecon al la redaktanto kopii en ĝi tekston kaj la vortaro tiam montras liston de la jam eksistantaj aŭ ne ekzistantaj vortoj en la vortaro.
- 6) La ekrano "Inversilo" provizas la eblecon aŭtomate montri vortojn el la Eo->Tr parto kaj ebligi la redaktanton enigi ilin rapide en la Tr->Eo flanko.
- 7) Estas la ebleco montri statistikojn el la vortaro.



La ligilo al la vortaro estas : <https://tr-vortaro.info/>

Turkaj esperantistoj, bonvolu aldoni la ligilon en via listo de "ofte uzataj paĝoj".

¹ En tiu punkto ni devas menciigi la verkon "Esperanto-Turka Granda Vortaro" de Hayrettin Dural, la prezidanto de la lasta Esperanto Asocio. Tamen Hayrettin Dural forpasis antaŭ ol li sukcesis kompletigi tiun verkon. La vortaro, li provis krei, estas tre ampleksa verko. Post lia forpaso, lia filino pibonigis ĝian aspekton kaj presigis malmultan nombron da kopioj omaĝe al sia patro sed la vortaro bezonas gravan redaktadon kaj ĝustigon, kiun oni povas realigi nur per longdaŭra laboro.

² <http://vortaro.net/>

İstatistikler	
İçerik	
Kök	🟢 🟡 🟠 🟤
Madde	2739 21 2760
Tanım	5200 117 5317
	5311 163 5474

Mi eliris el la domo esperante, ke mi renkontus iun junan, buntan, senzorgan, sanan, kaj gajan vizaĝon. Renkontiĝonte tian vizaĝon mia maljuneco, flaveco, maltrankvileco, malsaneco, kaj malgajeco tute ne malaperus. Plue mi eble entute enfalus en pesimismo kaj senespero sed mi tion ja volis fari. Mi vagadis, tamen, pensante, ke mi tian vizaĝon neniam renkontos. Mia decido estis kiel opinio de kritikisto kiu prijuĝas libron sen malfermante ĝian kovrilon. Neniu kritikisto malfermas libron per tremantaj manoj kaj kvazaŭ svenante pro plezuro. Tia plezuro troviĝas nur en tiuj, kiuj restas legantoj. Jen, mi elirante al la strato sciis, ke mi malkovrus difekton en ĉiu libro de la strata biblioteko. Neniu maljuna homo povus esti bela kiel unujara ĉevalido, neniu senzorga homo en la mondo ĝojus kiel hundo, kiu revidas sian mastron.

Eĉ tiu universitata studento, kun la pintaj lipharoj, la brilanta hararo, la puraj vestaĵoj, kaj la sep fotoj de belaj knabinoj en la poŝo, ĉiuj enamiĝintaj al li, havas koncernojn. Mi neniel povas kredi je tio. Nek dekstro, nek maldekstro; nek oriento, nek okcidento; nek kredo, nek malkredo; nek paco, nek milito... La plej grandan koncernon havas tiu junulo!

Mi surstrate renkontis Hasan, la ŝoforon.

– Hieraŭ nokte mi apenaŭ dormis, li diris, mian kapon mi sentas kvazaŭ ĝi estas iu granda kaldrono. Mi eĉ ne volas malfermi la radion. Mi ĉiutage enspezas 10 aŭ 20 lira-ojn¹. Sed ili foriras kiel akvo elglitas el mia mano. Mi ne plu povas elteni vivon sen drinkadi.

Poste mi vidis, iun strat-infanon kiu estis vendanta maĉgumojn. Li ŝajnis gaja kune kun sia amiko. Rakontante la batalon inter la ŝtelisto kaj la detektivo, sceno kiun li vidis en filmo en la kinejo Alkazar², la malsupro de siaj okuloj estis kuntiriĝantaj. Sed sub liaj bluaj-ruĝaj okuloj oni klare vidis flagrantajn signojn de sendormeco.

Tiu bela virino estis trompita. Tiu ĉi bela viro estas senmona. Tiu ĉi riĉulo estas malsana je la renoj. Tiu virino, kies edzo estas riĉa, kaj ŝi posedas ĉion, enfalis en la frenezecon trompi sian edzon. Sed ŝi tion ne povas fari...

Dum en la kafejo, elpensante malĝojecojn kaj maltrankvilecojn por rakonti al la aliaj, kiuj estis sidantaj ĉirkaŭ mi, viro en la apuda tablo subite komencis paroli al sia amiko:

– Ĉu vi vidas tiun viron? Li diris.

– Kiun?

– Tiun, kies kapo estas sen ĉapelo. Tiŭ, kiu nun estas antaŭ la kinejo sed baldaŭ preterpasos nin.

– Nu, kio pri li !

– Li havas unu milionon da lira-oj.

– Ve, la idioto, ve! Li vagadas sen aŭto.

– Tamen, li ja havas aŭton.

– Kiu scias kiom senzorga viro li

estas.

– Ne mia frato, tiu ankaŭ havas zorgon, certe.

– Ba ! Kian zorgon li povas havi ? Li estas juna, bela...

La alia eklistigis:

– Li havas belan edzinon, rusan konkubinon dolĉa kiel mielo. Li estas sana, li estas influa...

– Do ?...

– Sed li havas ian zorgon.

– Kio ĝi estas ?

– Mi, kaj kelkaj aliaj homoj, kiel mi.

– Ne troigu !

– Certe, ni ĉiuj scias lian pasintecon. Kiam li renkontos nin li dispeciĝos.

– Rigardu al tiu alia viro, li ŝajnas senzorgema pri la tuta mondo.

Tiun alian viron mi ankaŭ konis. Li estis komediisto, kiu faris homojn ridi kaj ridegi. Kaj li certe estis tre bona artisto. Tuberkulozo estis ronĝanta siajn pulmojn sed tamen li estas gaja. Li gajnis monon kaj tempon. Sed lia ĉefa zorgo estas liaj geamikoj. Ili estas jaluzaj. Ili elparolas vortojn por humiligi lin kaj kun la intenco, ke tiuj vortoj iru al liaj oreloj. Li estas tre sentema homo. Tiuj vortoj trapenetras en liajn pulmojn eĉ pli ol tuberkulozo.

Mi tagmanĝis gaje. Hodiaŭ homoj estis maltrankvilaj kun multaj zorgoj. Sed la senzorgan mi renkontis posttagmeze.

Tiu estis juna poeto. Neniu de liaj poemoj valoris eĉ unu kuruŝ-on³. Li estis kredanta je si mem, kiel piulo kredas je Dio. Ĉiutage li verkis 700 versojn. Li estis senmona. Li havis imagajn koramikojn. Li loĝis en imagaj palacoj kaj li manĝis en imagaj tabloj.

– Kiel vi fartas granda poeto? mi diris.

Li prenis mian brakon. Li parkere legis sep dek versojn. Sed en neniu de tiuj versoj estis fajrero de poezio.

– Feliĉa vi estas poeto, mi diris.

Rigardante al mi liaj okuloj estis brilantaj. Subite mi sentis ian kompaton por li. Kaj tiam li aldonis:

– Jes, kaj ankaŭ, li diris, se mi ne havus tiun koksopation...

Mi tiam komprenis, ke ni ĉiuj, la universitata studento, la ŝoforo, la milionulo, la maĉgumvendanto, la konstruisto, la skribisto, la bona poeto, la malbona



poeto ĉiuj portis en la interno unu malbonan sed feliĉan poeton. En imagaj tabloj kun imagaj vinoj, en imagaj landoj kun imagaj bienoj, ĉiam kun imagaj tintantaj ormoneroj ni ĉiuj, ĉiuj estis feliĉaj.



rakonto de
Sait Faik Abasiyanik

Publikigita en ĵurnalo "Yedigün"
jaro: 16, no: 13, 12/6/1948

¹ *lira aŭ turka lira : monunuo de Turkujo*

² *kinejo Alkazar : fama kinejo en Bejoglu distrikto de Istanbul*

³ *kuruŝ : unu centono de turka monunuo lira-o*

tradukis **Vasil Kadifeli**, el Turkujo

***** Dua premio en branĉo prozo ĉe la Tradukkonkurso "Lucija Borčić 2018" de la Kroata Esperantista Unuiĝo**

La batalo de farmisto Gamli kontraŭ la nederlandanoj -- islanda popolrakonto

Oni rimarkas ke iusomere farmisto Gamli remis fiŝkapti el la fjordo Eyjafjörður [Fjordo de insuloj] norden al la fiŝkapejo nomata Ólafsfjarðarmið [Fiŝkapejo de Olafs-fjordo]. Ili estis sesope. lumatene ili kaptadis sur profunda maro, kaj kiam proksimis tagmezo kaj ili jam plenigis la boaton, ili vidis nederlandan ŝipon fiŝkaptadi. Gamli tiam diris al siaj homoj: „Ni vizitu tiun fiŝkaptŝipon, kaj ni tie ricevos bonan vinon. Ĉiukaze ni devas atendi la elmaran venteton por reveni en Eyjafjörður.“ Ili konsentis. Ili remis al la ŝipo. Ĝi situis malproksime de la bordo. Gamli kaj liaj kunuloj fiksligis sian boaton al la ŝipo kaj supreniris. La nederlandanoj ĝoje ilin bonvenigis, kiel estis kutime. Ili estis 10 aŭ 12. Gamli rigardas multloke en la ŝipo, kaj vidas multajn bonvaloraĵojn. Li ekpensas perforte preni la ŝipon kaj venigi ĝin en la fjordon. Li scias ke ĝi estas eksterleĝa en la regno de la dana reĝo ĉi-lande. Li diskutas tion mallaŭte kun siaj homoj kaj ili konsentas. Poste li prenas ĉiun nederlandanon kaj fiksligas ilin krom la kapitano, kiun li ordonis konduki la ŝipon en Eyjafjörður. Nun la veloj estis hisitaj kaj samtempe venis favora vento. La eksterlandano gvidis kvankam kontraŭvole, sed Gamli kaj liaj kunuloj refoje ekdrinkis kaj festenis el la havaĵoj de la ŝipuloj. Oni diras, ke la kapitano provis iamaniere signali per sia navigmaniero, tiel ke liaj samlandanoj povus kompreni, se ili estus proksime, tamen tiel, ke Gamli kaj liaj kunuloj ne tion rimarkis, sed la kapitano sciis pri du aliaj nederlandaj ŝipoj sur la maro proksime. La vojaĝo estis rapida en la fjordon, sed kiam ili atingis Bakkaálar [Profundojn de Bakki] Gamli kaj liaj kunuloj vidis, ke du nederlandaj ŝipoj sekvas ilin rapidege kun ĉiuj veloj hisitaj. Gamli kaj liaj kunuloj daŭrigas la veturon ĝis ili estas ĉe Svalbarðseyri [Terlango de Svalbarð]. Tie la ŝipoj atingis ilin. Gamli kaj liaj kunuloj pretigis defendi sin. Li diris al siaj kunuloj, ke ili kvinope defendu unu flankon de la ŝipo, por ke la aliaj ne sukcesos surŝipiĝi, kaj ke li mem defendos la alian flankon tiom longe kiom eblas. La ĵus venintaj

demandis Gamli, ĉu li ne volus pace redoni la ŝipon kaj malligi la ligitajn pli ol meti sin en danĝeron kaj poste suferi laŭ volo de la venkontoj. Gamli diris, ke tio tute ne eblas senbatale, kaj nun ĉiu taŭgu laŭ sia povo, kaj ke oni preferus morti heroe, se oni devus morti. Komenciĝis nun la batalo kaj oni kuraĝe batalis per ĉio, kion oni povis manpreni. Gamli ekprenis mastostangon kiu kuŝis sur la ferdeko, kaj rompis ĝin sur sia genuo, kaj batalis per unu ĝia parto. Ĉiu devis malproksimiĝi de li, kaj multaj vundiĝis. La batalo daŭris longe dum la tago. Sed okazis fine, ke atakantoj sukcesis surŝipiĝi sur tiu flanko, kiun defendis la kunuloj de Gamli, kaj la venintoj malliberigis kaj fiksligis ilin. Oni tuj malligis la kaptitajn nederlandanojn kaj ili helpis siajn samlandanojn. Oni nun atakis Gamli el ĉiu direkto, sed li longe defendis sin. Sed fine oni tiom densiĝis ĉirkaŭ li, ke li nur povis batali kun la pugnoj. Li nun estis kaptita kaj firme ligita. Li tre lacegis, sed estis apenaŭ vundita, sed la plejparto de la batalintoj havis vundojn kaj damaĝojn, kaj oni diras, ke du nederlandanoj mortis. Oni nun diskutis, kiun punon Gamli meritis suferi, kaj oni verdiktis laŭ malnovaj ŝipleĝoj, ke oni tiru lin trifoje sub la kilon, kaj li liberiĝus se li travivus tion, sed tian traktadon malmultaj aŭ neniu povis travivi. Oni nun realigis tiun punon, kaj Gamli estis vivanta post la tria fojo. Li tre suferis, kaj oni diras, ke li petis ilin forhaki sian kapon tiel rapide kiel eble. La nederlandanoj tre miris pro tio, kiom eltenis tiu homo, kaj ne pli malmulte pro lia kuraĝo kaj heroa defendado. Li kaj liaj kunuloj estos nun tute liberigitaj, kaj poste oni donis al li indajn donacojn por sia heroeco kaj grandula entrepreno. Li donis al ili ĵuron, ke li neniam plu petolaĉu kontraŭ nederlandanoj, kie ajn li trovus ilin surmare. Gamli nun reprenis sian boaton kaj kaptaĵon kaj iris hejmen, sed la nederlandanoj iris el la fjordo. Tiu okazaĵo vaste diskonatiĝis, eĉ eksterlande kaj ŝajnis al la plej multaj, ke ankoraŭ loĝas nordula animo en vikinga koro en Islando.

Arkitekturo sakrala

Malgranda Slovakio en meza Eŭropo (kun areo 49 035 km²) havas 61 lignajn sakralajn konstruaĵojn: 44 grekkatolikajn kaj ortodoksajn templojn, 11 romkatolikajn preĝejojn kaj ses evangeliajn artikolajn preĝejojn. Ĉio ĉi reprezentas belegan sakralan arkitekturon de Slovakio, kiu estas admirata de indiĝenaj kaj eksterlandaj vizitantoj el tuta mondo. Kelkaj el la slovakaj lignaj temploj kaj preĝejoj estas enskribitaj ankaŭ en la Listo de monda Heredaĵo de Unesko.

La plej granda ligna evangelia preĝejo en Slovakio kaj samtempe en meza Eŭropo troviĝas en la malgranda vilaĝeto Svätý Kríž (esperante Sankta Kruco), situanta ĉirkaŭ 14 km de la urbeto Liptovský Mikuláš (esperante Liptova Sankta Nikolao, norda Slovakio). Pro kio estas ĉi tiu artikola preĝejo interesa? Juĝu mem!

La artikolaj preĝejoj estas propre sakralaj konstruaĵoj, konstruitaj surbaze de leĝa artikolo n-ro 25 pri la t.n. Soprona Kunveno (1681), kiu ebligis konstruadon de ekleziaj objektoj en kelkaj departementoj de la hungara Reĝlando. El la vorto „artikolo” estis derivita nova nomo – „artikola preĝejo”. Laŭ artikolo n-ro 25 la temploj kaj la preĝejoj devis esti konstruataj rando de urbo/vilaĝo, aŭ ekster urbaj/vilaĝaj limoj, ili devis esti konstruitaj en la daŭro de unu jaro tute el ligno kaj sen uzo de feraj elementoj (najloj, lado), ili povis havi nek turon, nek sonorilturon kaj la eniro en la preĝejon ne povis esti rekte el la strato.

En la beleca nord-slovaka regiono Liptov estis konstruitaj du tiaj artikolaj preĝejoj. La unua en la vilaĝeto Hybe en 1681, ĝin ruinigis incendio en 1823. La dua en la vilaĝeto Paludza en 1693. Konsidere la nombron de la evangeliaj fiduloj en apudaj vilaĝoj kaj setlejoj estis necese konstrui novan grandan preĝejon. Pro tio la loka eklezio faris kontrakton la 5an de marto 1774 kun ĉarpentista majstro Jozef Lang por rekonstruado de la origina preĝejo. Majstro Lang finis la rekonstruadon de la preĝejo jam la 11an de novembro en la sama jaro. Do nekredible rapide,

verkis kaj sendis Julius Hauser, el Slovakio

malgraŭ tio, ke la ĉarpentisto ne uzis konstruprojektojn, ĉar li sciis nek legi, nek skribi kaj en la laboro li devis fidi al siaj propraj ĉarpentistaj spertoj.



La sonorilturo estis konstruita poste, en la jaro 1781, kiam la imperiestro de la Sankta Roma Imperio, Jozefo la 2a, eldonis la t.n. Tolereman patenton, kaj ĝi staras aparte, sed formas kun la preĝejo harmonian tuton. La tri originalaj sonoriloj el la 18a jarcento en la unua mondmilito estis konfiskitaj por militaj celoj. La nuntempaj sonoriloj estas el 1924 kaj havas la sekvajn nomojn: Kredo, Espero kaj Amo. La tera plano de la artikola preĝejo havas la formon de kruco. La longo de la preĝejo kun la sonorilturo estas 43 m, ĝi havas 12 pordojn kaj 72 fenestrojn. Povas esti en la artikola preĝejo ĉirkaŭ 6000 personoj.

La konstruado de la akvobaraĵo Liptovská Mara (Esperante Liptova Maro) – la plej granda akvorezervujo de Slovakio – en la jaroj 1965-1975 kaŭzis, ke la tuta vilaĝo Paludza estis inundita kaj 940 familioj, kio prezentis pli ol 4000 loĝantojn, estis translokitaj. Ankaŭ la origina artikola preĝejo estis dismuntita en 1974 kaj transportita en la proksiman vilaĝeton, Svätý Kríž, kie ĝi estis denove konstruita en sia origina formo. La unua solena meso en la rekonstruita preĝejo estis en 1982 en la ĉeesto de pli ol 10 000 homoj.

El la interna ekipaĵo estas rimarkinda precipe la ligna baroka altaro, devenanta el la origina preĝejo. La orgeno devenas el 1760, la ĉefa plafonlumo el venecia kristalo el 1780. La galerioj estas ornamitaj per bibliaj pentraĵoj sur lignaj tabuloj.

La artikola preĝejo en Svätý Kríž estas sendube la plej grava arta esprimo de ligna sakrala arkitekturo en Slovakio kaj ĝi estas rekta okulatestanto de la reformacia movado de la 17a kaj 18a jarcentoj.

verkis kaj sendis **Julius Hauser** el Slovakio

La ligna Evangelia preĝejo en Slovakio; fotoj: Sonja Hauserova, edzino de Julius.



14 > *** *Islanda popolrakonto skribita de Bólu-Hjálmar (1796-1875). La protagonisto, Gamaliel Pétursson ("Gamli") naskiĝis en 1625. La rakonton tradukis*

radukis Steinþór Sigurðsson. La tradukaĵo aperis en la 60-a numero de La Tradukisto (2009)

sendis **Steinþór Sigurðsson** el Islando.

La maldiskreta kamparanino

Estis maja tago, kaj mi estis juna instruistino. Brilis la suno, ĉio abunde ekverdis. Mi havis du liberajn horojn en la lernejo. En la profesoran ĉambron neniam eniris la suno, ĝi estis en la norda parto de la konstruaĵo. La gekolegoj eniris en la klasojn. Nur la fumo de iliaj cigaredoj restis. Eksteren! vekigi en mi la deziro. En la naturon! Sed kion dirus miaj koleginoj, se mi, virino, irus sola en la kamparon? Kaj la vilaĝanoj, kion ili pensus: Virino, sola kion faras ekster la vilaĝo? Sed mia sopiro iri en la sunplenan, printempan naturon el la malhela, fumoplena ejo estis pli forta, ol la timo pro onidiro. Krome mi esperis, ke mia „ekskurseto” restos sekreta, neniu ekvidos min en tiu loko.

Kun batanta koro mi ekiris. Rapide piedirante, post duonhoro mi estis en bela loko: Ĉie verdaĵo, tiu freŝa helverdo, kiu karakterizas la komencon de la printempo. Birdoj kantis ĉie, kaj mi feliĉe ekkuŝis sur la herbejon. Neniu demandis min survoje, kien mi iras, neniu vidas min kuŝantan. Mi trankviliĝis kaj feliĉe ĝuis la majan tagon, tute sola en la vasta surmonteta herbejo. Despli mi ĝuis la feliĉon, ĉar mi havis nur malmultan tempon, ja mi devis reiri ĝustatempe en la lernejon, mi devis fari instruhoron. Sed mi havas unu horo da libereco! Neniu ĝenas min, poste mi reiros rapide en la lernejon. Meritis venki la malkuraĝon. Se oni rezignas pri ĉio pro onidiro, oni rezignas ĝui la vivon, mi pensis kuraĝigante min.

Kial diable mi devus iri al Triesto por partopreni la Italan Esperanto-kongreson?

Kial diable mi devus iri al Triesto por partopreni la Italan Esperanto-kongreson?

Ni komencu de la komenco. En venonta aŭgusto de la 24-a ĝis la 31-a okazos la kutima internacia Itala Kongreso de Esperanto en Triesto, <https://kongreso2019.esperanto.it/86/>.

Se vi konas la koncepton Meza Eŭropo/ Mitteleuropa, vi devus iri pro tio, ĉar Triesto estis la plej okcidenta urbo de tiu regiono kaj la aŭstra imperiestro estas ankoraŭ rigardata same ame kiel oni rigardas al la propra avo. 50 jaroj da itala regado nur sukcesis komprenigi, ke estis io tre bona en la malnova mezeŭropa ordo.

Sed se vi ŝatas la novan koncepton pri Eŭropa Unio, vi devos partopreni tiun kongreson ankaŭ pro tio, ĉar tie vi renkontos la estrojn de Eŭropa Esperanto Unio, kiuj prelegos pri pluraj aspektoj de la nuna eŭropunia situacio fronte al la nova mondo regata de grandaj potencaj landoj, ĉe kiuj EU devas aserti sin.

verkis kaj sendis Lenke Szász, el Rumanio

Foje mi eksidis, ĉirkaŭrigardis kaj... ho, ve! Ne tro malproksime kamparanino staras, kaj rigardas min. Mia koro ekbatis, mia trankvilo malaperis. Mi rigardis ŝajne indiferece en alian direkton – ja ŝi ne ĝenas min!... Nenion malbonan mi faras. Mi rajtas ĝui la belecon de la naturo eĉ sola! Mi defendis min senvorte.

La kamparanino daŭre fiksrigardis min. Ĉu ŝi ne havas kion fari?! Kial interesas ŝin, kion mi faras? – mi pensis indigne. Mi restis kuŝanta. Sed.. se mi kuŝas, eble ŝi pensos, ke mi ne estas sola... Mi do eksidis kaj klopodis ŝajniĝi tute trankvila, kvazaŭ estus tute normala afero, ke juna instruistino estas sola en la herbo en la senhoma kamparo. De tempo al tempo mi kaŝrigardis al la kamparanino. Kiel maldiskreta ŝi estas, ankaŭ nun ŝi rigardas min. Kion ŝi pensas? Kial ŝi ne faras sian laboron? Ŝi estas impertinenta! - mi koleriĝis. Sed ŝi ne pensu, ke timigis min! Tutkaze, jam proksimas la tempo de mia reiro. Sed mi ne reiros kvazaŭ pelata de ŝi! Mi iros ĝuste en tiun direkton, kaj trankvile preterpasos ŝin!

Tion mi faris. De pli proksime mi vidis ŝin pli bone. La impertinenta kamparanino estis ... birdotimigilo.

verkis kaj sendis **Lenke Szász**, el Rumanio

*** Ĝi aperis en Heroldo de Esperanto, en la jaro 2011.

Tute aparte unu evento traktos la eŭropan politikon pri instruado de fremdaj lingvoj en la ŝtatoj de EU. Ĉu estos pli bona okazo por starigi komunan strategion por Esperanto en EU?

Evidente vi havos problemon elekti viziti la kongresan urbon mem aŭ

partopreni la ekskursojn, kiuj portos vin ankaŭ al Slovenujo. Bonvolu rigardi ĉi tiun paĝon por konstati la malfacilaĵojn de la elekto: <https://kongreso2019.esperanto.it/ekskursoj/>.

Tamen ne pensu tro multe! Regalu vin per la internacia Itala kongreso: <https://kongreso2019.esperanto.it/aligxilo/>

La LKK - NFORMITALE 232



Estis ili duopo, junulino kaj junulo, fortaj, fidemaj: do ili komencis agi. La forton kaj la ŝviton de siaj korpoj, la sangon de vunditaj manplatoj, laciĝintajn tendenojn de piedoj ili kunkonstruis en tiun domon.

Ĉio ĉi daŭris multajn jarojn. Kelkfoje mankis al ili la mono, do ili reveturis al benzinodoraj stratoj, al la hurlanta urbo. Ŝia hararo senkoloriĝis, ĉirkaŭ la okuloj kolektiĝis sulketoj. Ŝi fariĝis lacema, nervoza. La viro jam estis cinikulo, strebaĉanto.

Sed la domon ili ne perfidis, ties ideo tuttempe vivis en ili. Estis ĝi fera deziro, morda, obstina sonĝo. Ili sciis, ke ĝin ili devas konstrui. Altigos ili tiujn murojn, kovros ĉion per tegmento prirevita...

Denove pasis kelkaj jaroj. Ili ankoraŭ ne estis mezaĝaj, sed ja ne plu junaj. Lia iro estis urseca, Ŝi fariĝis pli osteca, malmolpieda. Ankaŭ ŝia voĉo estis jam pli dura.

Staris fine la muroj, nuda skeleto de la ĉambroj. luvespere ili eniris, haltis meze, sed nur fakvortoj aperis en la cerboj. Mortero, akvotubo, ĉarpentilo, kahelo, hejtilo. Do, ili plu konstruis la domon. Printempe pluvegoj rapidaj, dum la longaj aŭtunoj, obstinaj, grizaj pluvoj malhelpis ilin. Vintre la senkolora

betono elstaris el la neĝa kovrilo. Somere la aero vibris pro la varmego kaj ili soifis.

Iutage la domo finfine estis preta. Do, ili tuj komencis alkonstrui ankaŭ la barieron ĉiuflankan kaj pordegon belan. Poste ili konstruis vojon de la pordego ĝis la domo, kaj ĝardenon verdan, floran; portis ene la meblojn, pendigis lampojn kaj kurtenojn. El la kranoj elverŝiĝis akvo, lumo dissaltis ĉien en la ĉambroj.

Duope, ili fine eniris. Sidiĝis ili en la plej grandan ĉambron. La silenton ŝiris nur ilia anhelado. La virino, la viro rigardis la murojn. Ja ili konis bonege ĉiun brikon, fenestrokadron, plankotabulon, klinkon.

Ili estis nur tre lacaj. Kaj ankaŭ la silento fariĝis ne elportebla.

Kaj ambaŭ subite eksentis, ke ili ne plu havos kion diri unu al la alia.

verkis **István Nemere**, el Hungario



Aperis en libro: István Nemere: Krokize de mia ĝardeno, Kooperativo de Literatura Foiro, 1992
 Fonto: https://www.berzsényi.hu/dibusz/nyelvek_napja/palyazatok_versenyek/mufordit15_eszperanto.pdf

El la libro de "Dao De Jing" verkita de ĉina filozofo Laocio, fondinto de Taoismo (30)

DUA PARTO - LA VIVO



55

Kiu firmtenas la tutan VIVO-n, tiu similas al novnaskita infaneto: Venenaj serpentoj ne mordas ĝin. Sovaĝaj bestoj ĝin ne kaptas. Rabobirdoj ne bekuŝas ĝin. Ĝiaj ostoj estas malfortaj, ĝiaj tendenoj softaj, kaj tamen ĝi firme povas mankapti ion. Ĝi ankoraŭ ne scias ion pri geedzoj, kaj tamen viglas ĝia sango, ĉar ĝi havas la tutan semon. Ĝi povas krei dum la tuta tago, kaj tamen ĝia voĉo ne fariĝas raŭka, ĉar ĝi havas la tutan pacon. Ekkoni la pacon signifas esti eterne. Ekkoni la eternecon signifas pensi ĝuste. Pliigi la vivon oni nomas feliĉo. Por siaj deziroj uzi siajn fortojn, oni nomas esti forta. Se la aĝoj fariĝis fortaj, tiukaze ili maljuniĝas. Ĉar tio estas kontraŭ-TAŬO. Kaj kontraŭ-TAŬO estas proksime de la fino.

Rimarko de Anniespera

Vilhelmo:

"Ĝi ankoraŭ ne scias ion pri geedzoj, kaj tamen viglas ĝia sango, ĉar ĝi havas la tutan semon."

Laŭ la originalo miaopinie la traduko de Wang Chongfang estas pli preciza:

"Kiu scias ankoraŭ nenion pri la koito de masklo kaj femalo, sed kies seksa membro povas spontanee erektiĝi, Ĉar en li la vitala forto estas je sia kulmino;"

Rimarko de Cezar

Mi relernis kaj memoris el tiu artikolo antaŭ ĉio tion, ke forto estas pli ol nur fizika forto. La vivforto de bebo estas pli granda ol tiu de plenkreskulo. Krome Laocio konsilas, ke ni firmtenu la vivon. La tasko de vivanto estas vivi, ne esti vivante jam morta. Kiam ni estos mortaj, ni havos sufiĉe da tempo por esti mortaj.

(daŭrigota)

Rakonto de
Adil Olluri, el Albanujo

La mateno krepuskis blankigita pro granda neĝo, falinta tutan nokton. La urbo frostotremis pro la malvarmo, same kiel la loĝantoj, kiujn ĝi entenis. Neniu aperis surstrate, nenia homa ombro, eĉ la katoj kaj vagabondaj hundoj estis rifuĝintaj en pli varmaj kaŝanguloj kaj loĝejaj subteraĵoj.

Neniu laboris; la oficejoj, la bankoj, la kafejoj, ĉiuj estis fermitaj, krom la apoteko, kies proprietulo rezultiĝis pli brava, ankaŭ iome por ne lasi la civitanojn sen medikamentoj, sed pli multe por enspezi dum ĉi tiu terura tago, li decidis malfermi la medikamentejon.

En la larĝa, pavimita per marmoro strato, ekaperis nigrakapuĉa maljunulo. Liaj malrapidaj paŝoj, sekvantaj unu la alian, rompis la virgecon de la senpiedpremita neĝo, kies eroj, impete falanta, frapadis la maljunulon, kvazaŭ punuragano, al kio neniu alfrontiĝus.

La lacigita maljunulo, plenenspirite kaj frostotreme, eniris la apotekon. La farmacistino, sidanta kaj manikuranta, ekstartiĝis kaj alproksimiĝis al la vitro, dividanta ŝin disde la klientoj. Ŝi ofertis al la maljunulo ĉiujn medikamentojn demanditaj de li.

- Kiom kostas entute? - demandis la maljunulo.
- 38 eŭroj, onklo- respondis la farmacistino.
- Euu..Tre karaj, do, ĉi prezoj!- ronronis la maljunulo.- Ĉu vi povas kontroli ankoraŭfoje la

prezojn, ĉar, eble, ili estas ne tiel karaj.

- Nu...- ŝi krispis la brakojn .

La maljunulo surmetis la saketon kun medikamentoj sur la vendostablo, ŝovigis ĝin malrapide al la apotekistino kaj eliris mallevkape el la apoteko. Li estis anime moligita, ne sciis kien iri, rigardis la urbon en ĉiuj ties kvar flankoj kaj daŭrigis la vojon de reveno, piedpremante sur la antaŭaj paŝospuroj, denove interluktante kun la uragano de la neĝofaloj, frapantaj lin senkompatate.

Li eksentis doloron en la maldekstra flanko de la brusto. La maljunulo manpremis la korlokon kaj eksidis sur frostigita benko de la blankigita parko.



tradukis **Bardhyl Selimi, el Albanujo**



Libelo kaj Formiko

fablo de Ivan Andrejevich Krilov (1769-1844) Rusio

La Libelo-flirtulin'
Kantis gaje en somero,
Sed subite sur la tero
Al somer' alvenis fin'.
Tute mortis kampo grena,
Jam forestas tag' serena,
Kiam en folia verd'
Estis manĝo kaj desert'.
Ĉio pasis; kun malvarmo
Venas tempo por mizer',
Mankas kantoj de somer';
Ĉu konvenas dum sufer'
Gaja kanto kiel garno?
Kun sopiro kaj ĉagren'
Al Formik' ĝi rampas jen.
"Ne forlasu min, amiko,
Donu helpon kun efiko, —
Ĝis printemp' kaj suna bril'
Ne rifuzu pri azil'."

"Amikin', ĝi strangas vere,
Ĉu laboris vi somere?"
Ŝin demandas la Formik'.
"Ĉu mi eblon tiun havis?
En la herba milda mol'
Gaja kanto kun petol',
Kun amuz' nin plene ravis!"
"Ha, vi estis..." — ,Dum somero
Mi kantadis kun pasi'."
"Do vi kantis? — Bon-afero:
Nun ekdancu kun graci!)"

verkis **Ivan Andrejevich Krilov**
(1769-1844) Rusio
tradukis
Sergej Grigorjeviĉ Rublov
(1901-1979) Ukrainio





Saluton,

En ĉi tiu numero de nia revueto ni daŭrigas la Mallongan Historion de Filozofio kun la jena filozofo.

Vasil Kadifeli

Karl Popper (1902–1994) kaj Thomas Kuhn (1922–1996)

Lerni el niaj eraroj

En la jaro 1666, kiam pomo falis sur la kapo de Isaac Newton, li inspiriĝis kaj malkovris la leĝojn pri universala gravito. Sed kion li faris poste? Ĉu li provis kolektadi pruvojn por pruvi, ke sia teorio estis ĝusta? Laŭ **Karl Popper** tute ne!

Sciencistoj, kiel ni ĉiuj, lernas el siaj eraroj. Scienco evoluigas kiam ni malkovras, ke iu pensmaniero de ni estas erara. Multaj homoj pensas, ke scienco evoluas kiam sciencistoj intuicias pri io kaj poste ili kolektas pruvojn por apogi siajn **hipotezojn**¹. Sed laŭ Popper sciencistoj provas falsigi siajn hipotezojn kaj ne apogi ilin. Sciencisto komencas per aŭdaca antaŭvido (hipotezo) kaj poste pere de eksperimentoj kaj observado oni provas falsigi ĝin.

Popper naskiĝis en Vieno en juda familio, kiu poste fariĝis kristano. Li en la tempo de Hitlero translokiĝis al NovZelando kaj pli poste al Londono kiel li fariĝis profesoro en la Londona Skolo de Ekonomio. Li interesiĝis pri scienco, psikologio, politiko, muziko sed ĉefe pri filozofio. Li kontribuis multon al filozofio pri scienco kaj politiko. Antaŭ ol li verkis pri la metodo de scienco, multaj homoj pensis, ke sciencistoj provas kolekti pruvojn, kiuj apogos siajn pensojn kaj hipotezojn. Ni pensas ke ĉiuj cignoj estas blankaj, kaj hipotezas pri tio. Poste ni komencas observadon pri cignoj, pri multaj cignoj, kiom ajn eblas kaj fine ni konkludas, ke cignoj ja estas blankaj. Tio estas metodo de **indukto**². Tamen sufiĉus trovi nur unu nigran cignon por malpruvi tiun hipotezon. Kaj tio estas la "**problemo de indukto**". Scienco ne evoluas per induktado. Sciencistoj ne provas apogi sed falsigi hipotezojn. Tio estas metodo de **dedukto**³. Kiam oni falsigas iun hipotezon tiam oni malkovras novan eron da informo. Homaro antaŭeniras pro tio, kion ni lernas.

Se oni dirus "*la nevideblaj feoj ĉirkaŭ mi helpas min skribi ĉi tiujn frazojn*" ni ne povas falsigi tiun diron. Ni ne povas pruvi ke feoj ja ekzistas ĉar ili estas nevideblaj. Do, tiu diro ne estas scienca diro. Popper ankaŭ pensis, ke multaj hipotezoj de psikanalizo

ankaŭ ne estis falsigeblaj do por li ankaŭ psikanalizo ne estas scienco. Li ankaŭ same kontraŭstaris pri la seienceco marksismon, ĉar estas multaj ne falsigeblaj hipotezoj en ĝi.

La pensoj de Popper pri scienco efektis profunde multajn sciencistojn kaj filozofojn. Ekzemple la Nobel premiito Peter Medawar diris "*Laŭ mi Karl Popper estas la plej grava filozofo pri scienco kiu aperis en la mondo iam ajn*". Sciencistoj ŝatis liajn ideojn, ĉar li diris, ke scienco estis kreema kaj imagipova afero. Filozofoj tre ŝatis lian manieron superi la "**problemon de indukto**".

Tamen en 1962 usona fizikisto kaj historiisto **Thomas Kuhn** verkis sian libron "*La strukturo de sciencaj revolucioj*" en kiu li priskribis tute alian manieron pri kiel scienco evoluigas. Li diris ke Popper ne tiel bone ekzamenis la historion de scienco ĉar troviĝas ŝablonoj en la scienca metodo. Laŭ li sciencistoj laboras ene de ia kadro aŭ ia paradigmo kaj tiun laboron li nomis "*normala scienco*". Ekzemple, en la komenco oni pensis ke la Suno ĉirkaŭiras Teron kaj la centro de la universo estis la Tero. Do, sciencistoj faris sian laboron kadre de tiu paradigmo. Ĉu ili trovis nekongruajn aferojn, ili provis ekspliki ilin ankaŭ kadre de tiu paradigmo. Pli poste Copernicus malkovris, ke fakte Tero estis ĉirkaŭiranta la Sunon sed sciencistoj longe pensis ke Copernicus faris miskalkuladon kadre de la uzata paradigmo. Paradigmoj ŝangiĝas kiam la tuta komprenemo en scienco estas renversita sed tio okazas en relative longa tempo. Do, finfine ĉio ŝangiĝis laŭ la paradigmo de Copernicus kaj la centro de la universo fariĝis la Suno. Tiel, nova periodo de "*normala scienco*" komenciĝis.

Popper ne multe kongruis pri tio, kion Kuhn diris pri la historio de scienco tamen li akceptis, ke la koncepto "*normala scienco*" estis utila. Interesa demando estas: Ĉu Popper uzis malnovan paradigmon aŭ ĉu li estis pli proksima ol Kuhn al la vero de realeco.

¹ *hipotezo nepruvita supozo, provizore akceptita por klarigi kaj komprenigi konstatitajn faktojn, sed kontrolota per pluaj eksperimentoj*

² *indukto maniero de rezonado, konkludante el apartaj faktoj al ĝenerala leĝo, el specoj al specaro, el efikoj al kaŭzo*

³ *dedukto konkludo farita el la tuto pri la partoj, el la specaro pri la specoj, el ĝenerala principo pri ĝiaj konsekvencoj*

(daŭrigota)

Lina sidis surbenke kaj klakis per la dentoj pro malvarmo, desupre rigardis ŝin severe Mickiewicz mem, kvazaŭ malaprobante pro tro leĝera, kiel por tia venta vetero, vesto. Sed kion povis fari Nina? Ŝi simple ne povis surmeti ion alian, ol sian solan robon, kiu ne estis elŝrankigata dum kelkaj jaroj. Por almenaŭ iomete varmiĝi, ŝi frotis siajn akrajn apenaŭ kovritajn per sinteza robo genuojn kaj kunfrapis kalkanumetojn de ŝuoj speciale aĉetitaj por tiu okazo. Ŝi surmetis orajn orelingojn kaj oran ĉeneton kun kruceto, ŝminkis la lipojn, kio jam estis por ŝi tro multe da kosmetikaĵo sur la vizaĝo, kaj nun al ŝi ŝajnis, ke ĉiuj rigardis ŝin. Nina estus delonge translokiĝinta al la plej malproksima benko, kiu estas kaŝita ie malantaŭ siringaj arbustoj, se ŝi ne timus, ke li ne vidos ŝin tie. Ŝi estis veninta kvin minutoj pli frue, ŝi ŝatis ĉien alveni ĝustatempe, kaj pri tio, ke virino



Ĥristina Kozlovskaja

devus malfruiĝi al rendevuo, ŝi ne sciis, ĉar ŝi simple neniam iris al rendevuoj. Do ŝi havis ankoraŭ iom da tempo por profundigi en siajn pensojn. Nina denove rememoris ilian hieraŭan konversacion kaj pensis, ke li fakte pravas. Bestoj neniam egaliĝos al homoj. Nur homoj povas kunsenti, pardoni, amiki. Nur homo povas tiel pasie kaj sindone ami, ami dum la tuta vivo. Nina ne povis scii certe, ĉar neniam iun en sia vivo ŝi tiel amis, kaj neniu amis tiel ŝin, sed nun ŝi sentis, ke baldaŭ ĉio ĉi okazos al ŝi. Unuafoje ŝi deziris tion. Hieraaŭ veninte hejmen de laboro ŝi iel tute alie rigardis sian Floron. Ne, Nina ne intencis seniĝi de sia katinjo, simple nur hieraaŭ ŝi komprenis, ke ŝia tuta katronrona amo estas malvera. Eble same Floro estis iam alkuranta al sia antaŭa mastrino, kaj post Nina ĝi alkurus ankoraŭ al iu alia. Tiuvespere Nina spektis televidon sen Floro, ŝi ne surbrakigis la katinon, ne kuŝiĝis kun ĝi sur la sofo, ne aŭskultis ĝian

ronronadon. Tiunokte Nina pensis pri la morgaŭa renkontiĝo ĉe Mickiewicz kaj longan tempon ne povis endormiĝi.

Kaj jen ŝi estas ĉi tie ĉe la monumento sur la plej proksima de la monumento benko, tremante pro la malvarma vento, kaj la viro ĝis nun ne estas tie. Nina ekrigardis la horloĝon, jam estis dudek post la oka, sed ŝi eĉ ne pensis koleri, ŝi sciis, ke en granda urbo al homoj povas okazi diversaj incidentoj, ŝi tuj pensis pri malbone funkcia transporto, pri kavoj sur la vojoj, pri problemoj en la laborloko kaj ankoraŭ pri multo. Ŝi trovis dekojn da senkulpigoj pro lia malfruiĝo. Sed ju horloĝmontrilo proksimiĝis al la naŭa, des malplimultiĝis la listo de senkulpigoj, kaj kiam tiu montrilo estis jam sur la deka, la senkulpigoj tute finiĝis. Nina leviĝis de la benko kaj forlasis la placon de Mickiewicz. Neniam plu ŝi renkontis la sinjoron kun griza barbeto.

Nina eĉ ne rimarkis, ke ŝi trairis kelkilkilometran distancon de la urbocentro hejmen, preskaŭ ne memoris, kiel ŝi alvenis tien. Nur memoris ŝi penetran venton kaj pezajn pensojn. La lastaj ankoraŭ kaptis ŝin. Sed tio ne estis pensoj pri malfeliĉa amo, rompita koro kaj la senindulo. Ne, en tiuj pensoj ŝi simple poiome revenis al realeco, malsupreniĝis de la alteco de siaj ĥimeraj revoj pri nobla homo. Nina iĝis la iama Nina. Sed nun en ĉi Nina aperis io nova, iu amara postgusto de la antaŭnelonga seniluziigo. Ŝi plu ne povis resti indiferenta al la homoj, kia ŝi estis antaŭe. Ĉu ŝi koleris kontraŭ ili? Iomete. Ĉu ŝi sentis sin trompita? Certe. Ĉu ŝi ankoraŭ pensis, ke nur homo kapblas ami? Parte. Ĉar ŝi ankoraŭ kredis, ke homoj ne povas esti malamikoj unu al la alia. Ĝuste en tiu momento Nina envenis sian malpuran kaj, kiel ofte okazis, nelumigatan enirejon. Ŝi malfermis la stratpordon kaj paŝis certe en la mallumon, plu tremante pro malvarmo. Ŝi reflekse etendis antaŭen sian manon, esperante post kelkaj paŝoj palpetrovi parapeton, anstataŭe ŝi trafis ion strangan. Nina eĉ ne havis tempon por ektimi, kiam io dolorige kuntordis al ŝi tiun etenditan brakon malantaŭ ŝia dorso kaj fermis ŝian buŝon. Nina ekkriis sensone en ies polmon aŭ pro timo, aŭ pro doloro kaj sentis, kiel iu alia, ĝis nun kaŝita en mallumo, frapis ŝin sur la ventron. Nina denove kriis, denove sensone, ŝi volis kliniĝi, sed ne povis. Iu flustris en ŝian oreilon, ke ŝi ne moviĝu, kaj la virino senmoviĝis, moviĝis nur ŝiaj larmoj. Ili fluis de la okuloj sur tiun aliulan manon. Dua homo lumigis la vizaĝon de Nina, kaj senprokraste ŝiris la orajn orelingojn el la oreloj kaj la ĉeneton de la kolo. Nun ŝi



eksentis ankaŭ sangoguton sur sia kolo, kiu fluis el la ŝirita orelo. Li ektiris la sakon de ŝiaj manoj, Nina eĉ ne pensis kontraŭiĝi, senprokraste ellasis ĝin. Poste tiu, kiu estis malantaŭe, malfermis sian brakumon kaj ili ambaŭ malaperis, lasante Nina-n kuŝi sur la malvarma cemento inter la stratpordo kaj la unua ŝtupo.



Akvarelo de Natalia Pendjur

Nina plorsingultis laŭte, nun ŝi jam aŭdis sian ploron kaj estis certa, ke ĝin aŭdis ankaŭ ŝiaj najbaroj. Ŝi longe supreniris, tenante sian manon sur la parapeto, ĉar ŝiaj kruroj simple fleksiĝis, daŭre trenis sin sur sian kvinan etaĝon, premante sian dekstran manon al la ventro, sed neniu pordo de iu loĝejo malfermiĝis. Ŝi tiris la ŝlosilon el la jakpoŝo (estis bone, ke ŝi havis kutimon meti ĝin tien) kaj malŝlosis la pordon.

En la koridoro Nina-n jam atendis Floro. Ĝi rigardis la virinon per siaj grandaj okuloj, kvazaŭ ĉion komprenante. Nina ne povis sin deteni, ŝi falis genue

antaŭ la katino, brakumis ĝin kaj ploris, kisis ĝian moletan harojn kaj denove ploris. Ili ankoraŭ longe kuŝis tiel duope en la koridoro, ĝis Nina trankviliĝis kaj treniĝis en la banĉambron. Floro atendis ŝin ĉe la pordo, kaj kiam Nina sursofiĝis, ĝi sidiĝis apude surplanke.

Nina ne povis pri io pensi, ŝi sentis nur, kiel doloras ŝia ventro, kiel doloras la lezita orelo kaj la genuo estas furioze tordata profetante la veterŝanĝiĝon. Larmoj, kvankam malofte, tamen ankoraŭ verŝiĝetis el ŝiaj okuloj. Al Nina estis tiel amare, kiel neniam estis. Ŝi rompis sian bazan regulon, kaj vivo donacis pro tio al ŝi teruran aventuron. Ŝi ne volis kompati sin, sed kompatis. Ŝi ĝojus ekdormi pli rapide kaj forgesi pri ĉio, sed pro la neeltenebla doloro pri la dormo al ŝi restis nur revii. Subite Nina sentis, ke Floro saltis al ŝi sur la liton. La katino tiom mallaŭte tenere murmuris... Nina ĉiam amis tiun sonon pli ol ajnan muzikon. Kutime Floro kuŝiĝis, volviĝinte bule, proksime de la kuseno, Nina pensis, ke tiel estos ankaŭ nun. Sed ŝi eraris. Floro kuŝiĝis ĝuste sur la malsanan genuon. Nina sentis varman lanugan korpeton, sentis ĝin spiri, kaj ĉio ĉi tiel trankviligis ŝin, tiel lulis. Jam ie en duondormo Nina komprenis, ke jam doloras nek ŝia genuo, nek ventro, nek orelo, ke ĝenerale nenio plu doloras kaj maltrankviligas. Ŝi sentis jam nek bedaŭron, nek ofendon, nek seniluziĝon, sed nur kiel forte ŝi amas Floron kaj kiel forte Floro amas ŝin.

(Fino)

Originala rakonto : *Христина Козловська, Квітка ; aperis en la libro Коштовніше за золото, Brusturiv, Discursus, 2015*

Tri fratoj

Ĉi tiu estas fabelo de ĵemajtaj fabeloj tradukita el litova lingvo al Esperanto per samideano Antanas VAITKEVIČIUS, emerita instruisto de angla lingvo. Li loĝas en Alsėdžiai, distrikto de Plungė. Li esperantistiĝis preskaŭ antaŭ 50 jaroj dum studado en Vilnusa universitato (1966-1971). Li verkis versojn en Esperanto, partoprenadis konkursojn "Muzo". Ĝuu la tradukaĵon.

sendis **Povilas Jegorovas**
el *Litovio*

-- oOo --

Patro havis tri filojn. Kiam lia maljuneco alproksimiĝis, li decidis disdoni sian bienon al la filoj, tamen li ne povis pripensi, kiel ĉio estus juste disdonota. Unue li opiniis heredigi ĉion al la plejaĝulo, tamen tiuokaze la aliaj du estus molestitaj. Longe li pensis kaj finfine diris:

- Filĉoj miaj, mi ne elpensas kiel la bieno devas

-- de ĵemajtaj fabeloj, el Litovio

esti distribuota. Do, mi finpensis tiamaniere: Iru en la vastan mondon, laboru por unu jaro, kaj perlaboru por unu fingroringon. Kies ringo estos la plej bela, tiu posedos la bienon.

Nenio estas fareda, se la patro ordonas, ili devas iri. Kaj foriris ĉiuj por serĉi laboron. Irante tra la arbaro, la plej juna frato ekvidis malgrandan vojeton, meandrantan tra arbara densaĵo kaj li ekiris laŭ tiu-ĉi vojeto. Irinte unu mejlon, li ekvidis blankan kolombon, sidantan sur arbobranĉo. Kiam la junulo alproksimiĝis al li, la kolombo demandas lin:

-Kien vi iras, junulo?

-Mi iras por serĉi laboron, sed nur tian, por kiu mi ricevus fingroringon, la plej belan ringon en la tuta mondo,- respondis la junulo.

- Bone,- kapsvingis la kolombo, - iru kun mi. Mi kondukos vin al la loko, kie vi ricevos tian ringon.

La kolombo ekflugis kaj la junulo sekvis ĝin. Tuj li

ekestis ĉe malhela kaverno, enirinte kiun, li ekvidis palacon sen ia viva estaĵo. Pluirante en unu ĉambro ĉe la fenestro li trovis kaĝon kun fermita kolubro. La kolubro demandas lin:

- Kiel vi aperis ĉi-tie kaj kion vi serĉas?

- Irante tra la arbaro, mi ekvidis surbranĉe sidantan kolombon, kiu demandis min, kien mi iris. Kiam mi diris, ke mi serĉas laboron, ĝi gvidis min ĉi-tien. Jen kiel ĉio okazis.

Tiam la kolubro respondis:

- Se vi travivos ĉi-tie unu jaron, vi ricevos, kion vi deziras. Kaj la laboro estos jena: unu fojon tage vi ekbruligos la fornon, unu fojon balaos la ĉambregon kaj unu fojon vi lavos min per varma akvo. Kiam vi malsatiĝos, vi iros en tiun ĉambron kaj surtable vi trovos ĉion laŭ sia volo.

Do, la junulo faras ĉion laŭ la kolubraj ordonoj: ekbruligas la fornon, balaas la ĉambregon kaj lavas la kolubron per varma akvo. Post unu jaro li petas la kolubron la laborpagon, la plej belan ringon en la tuta mondo. Tiam la kolubro donis al li ŝlosilojn kaj ordonis malŝlosi unu kofron, plenan da plej mirindaj ringoj. La junulo prenis la plej elegantan ringon, kaj ferminte la kofron, redonis la ŝlosilojn al la kolubro. Tiam la kolubro petis, ke venontjare li ankaŭ revenu kaj servu al ĝi.

- Se mi sukcesos eskapi el mia hejmo, mi certe revenos, - li promesis.

Do, li iris hejmen, portante la ringon. Irante tra la arbaro li ekvidis ĉirkaŭbrulintan forningon. Li prenis ĝin, kaj turnante ĝin ĉirkaŭ sia brako pluvojaĝas. Post ia distanco li renkontis revenantajn hejmen fratojn. Ili demandas:

- Hej, frato, kie estas via ringo?

- Jen, ĉu vi ne vidas? Sur mia brako.

Ambaŭ fratoj ekridegis eĉ siajn ventrojn ĉirkaŭbrakuminte.

- Ba, nura stultula parolaĉo.

Veninte hejmen ambaŭ pli aĝaj fratoj surtabligis belajn ringojn, tamen kiam la plej junulo elpoŝigis la ringon, ricevitan de la lubriko, la tuta ĉambro eklumegis. La patro eĉ parolpovon perdis pro mirego.

- Filĉjo mia plej juna, via ringo estas plej bela, do al vi mi heredigas mian bienon.

Pro kolero malsereniĝis la vizĝoj de ambaŭ fratoj kaj ili ekprotestis:

- Ne, ni ne konsentas. Ja ni duoble laboris kaj ni pli rajtas ol ĉi tiu stultulo. Li sukcesis unufoje sed sekvontfoje li certe malsukcesos. Patro, donu ankoraŭ unu taskon.

Vidas la patro ke ambaŭ pliaĝaj filoj ne pravas, tamen ne dezirante la infanojn interkolorigi, li konsentis.

- Bone, reiru en la vastan mondon kaj post unu jaro portu al mi kaptukon. Kies kaptuko estos la plej bela, al tiu mi heredos la bienon.

Denove eliris ĉiuj fratoj feliĉon serĉi. La plej junulo senprokraste iris al la lubriko.

- Ĉu estos eble por mi ricevi la plej belan kaptukon por la jara servo? – demandas li lubrikon.

- Certe, - diras ĝi. Laboron vi konas, sed ĉion vi devos fari dufoje dum la tago: dufoje ekbruligi la fornon, dufoje balai la ĉambregon kaj dufoje lavi min. Manĝaĵon vi trovos en la sama ĉambro, same kiel pasintjare.

Tion la junulo faras. Kiam la jaro finiĝis, la kolubro donis al li ŝlosilon kaj diris:

- Malŝlosu la jenan kofron kaj prenu la plej ŝatatan kaptukon. Nur atentu viajn fratojn! Kiam vi renkontos ilin, nenion diru pri via kaptuko, ĉar ili forprenos la kaptukon kaj murdos vin. Tenu la kaptukon inter viaj fingroj kaj ĝi estos nevidebla. Se vi povos, revenu al mi por la tria jaro. Kaj nun – bonvojaĝon.

Eliris la plej junulo kaj baldaŭ renkontis siajn fratojn ankaŭ hejmen hastantajn. Liaj fratoj tuj demandas:

- Kie estas via kaptuko? Montru!

- Jen! – diris la plej junulo kaj montris naztukon.

- Ni konas, kia vi estas. Denove vi trompos nin, kiel pasintjare.

Tuj ili traserĉis liajn poŝojn, tamen nenion trovis.

Kiam ili venis hejmen kaj kiam la plej junulo sternis la kolubran kaptukon, ĉiuj preskaŭ perdis la vidkapablon pro la brilego. La patro havas nenian alian eblecon ol heredigi la bienon al la plej junulo.

Ambaŭ pliaĝuloj denove ekkverelis kun la patro. Oni ne estas vidinta, ke bieno estu heredigita al stultulo. Li hazarde sukcesis akiri la plej belan kaptukon, kaj li posedas neniam aliajn kapablojn.

-Bone, - finfine diras la patro, - vi provu ankoraŭfoje, sed tio estos la lasta provo. Iru en la vastan mondon por servi kaj revenu post unu jaro kun la plej bela knabino. Kies estos la plej brava, al tiu mi heredos la bienon.

Ree eliris la fratoj laboron kaj edzinojn por serĉi. Iras ambaŭ pliaĝuloj, ridegante senkontrolite: ĉu estas ebla por stultulo trovi belan fraŭlinon! Ĉi-foje ili estos venkintoj kaj la bieno apartenos al ili.

Kaj la plej junulo iris malgaja al la kolubro kaj diris:

- Mi ne konas, ĉu ĉi-foje vi sukcesos helpi min.

Patro ordonis konduki hejmen la plej belan fraŭlinon. Kaj kie mi povos akiri ŝin?

-Ne ĉagreniĝu, - diras la kolubro. – Mi tre ĝojas pro via reveno. Kaj nun aŭskultu, kion vi devos fari. Ĉi-jaro estos por vi pli malfacila ol la pasinta, ĉar ĉion vi devos fari trifoje: trifoje ekbruligi la fornon, trifoje balai la ĉambregon, kaj trifoje lavi min per varma akvo. La

lastan tagon tre bone bruligu la fornon, kaj post kiam vi lavos min ĵetu min en la fornon. Kiam vi estos min ĵetinta, kuregu for, ĉar mi ekkriegos petante por helpo, tamen vi ne aŭdacu eĉ malantaŭen rigardi. Se vi ĉion-ĉi plenumos, vi kaj ankaŭ mi ekestos feliĉaj, kaj se ne – ambaŭ ni pereos por ĉiam.

Faras la plejjunulo ĉion, kion la kolubro ordonis kaj pensas pri la lasta tago. Atendinte ĝin, li bone hejtis la fornon, lavis la kolubron kaj ĵetis ĝin en la forntruon, disradiantan teruran varmegon. Ekaŭdiĝis kriego kaj veado, ekstremis la muroj de la domo kaj muraj ŝtonoj ekfalas sur lian kapon. La plejjunulo pensis, ke lia lasta tago alvenis, do falinte en la angulon de la palaco li senkonsciiĝis. Jen li eksentis, ke li estas revivigata kaj li ekvidis belegan knabinon, starantan apud li. Anstataŭ la sombra palaco de la kolubro li ekvidis superban kastelon plenan da mirindaj sinjoroj, servantoj kaj soldatoj.

- Ni dankas vin, nia savinto. Nur vi eblis formeti la malican sorĉon, per kiu potenca sorĉistino transformis min en kolubron kaj mian kastelon en sombran palacon. Nun ni ambaŭ feliĉe vivos ĉi-tie.

- Jes,- konsentas la junulo,- tamen pli antaŭe ni veturos al mia patro, kiu atendas min.

Veturas ili al la patro de la junulo per kaleŝo jungita per ok ĉevaloj, kaj eĉ fajreroj flugas el sub ĝiaj piedoj. Ambaŭ, kvazaŭ reĝoj ili sidas en la kaleŝo, akompanataj de servantoj kaj soldatoj. Venis ili hejmen, kaj la patro kaj liaj fratoj kliniĝis antaŭ ili, tute ne rekonante ilin.

- Ĉu vi konas min? – demandas li.

- Ne, mi ne konas, via moŝto,- flustras timiĝinta patro kaj liaj du pliaĝaj fratoj. – Ni vidas vin por la unua fojo.

- Do mi estas via plej juna filo kaj via frato,- diras li, turninte al ili.- Mi ne bezonas la bienon, havu ĝin. Nur la patro veturu kun mi en mian kastelon, kie mi zorgos pri li ĝismorte.

La patro ĝoje akceptis la filan proponon kaj elveturis per reĝa kaleŝo. Li neniel finis miri pri la edzino de la plejjunulo, kaj ĉiuj admiris lian feliĉon.

La pliaĝaj fratoj ekestis bienposedantoj kaj ili ĵaluze rememoris la bonkoran plejjunulon.

Hori Jasuo: La Esperantisto de la Jaro 2018

-- el La Balta Ondo

Aa Ondo de Esperanto en 1998 iniciatis ĉiujaran proklamadon de la Esperantisto de la Jaro. Al ĉi tiu projekto aliĝis reprezentantoj de diversaj tendencoj en la Esperanto-komunumo kaj sendependaj kompetentuloj.

Kiel la unua laŭreato en 1998 estis elektita William Auld. En 1999 lin sekvis Keppel Enderby. En 2000 estis distingitaj tri personoj: Hans Bakker, Mauro La Torre kaj Jouko Lindstedt. Poste laŭreatiĝis Osmo Buller (2001), Michel Duc Goninaz (2002), Dafydd ab Iago (2003), Helmar Frank (2004), Povilas Jegorovas (2005), Bertilo Wennergren (2006), Peter Zilvar (2007), Ilona Koutny (2008), Aleksander Korĵenkov (2009), Katalin Kováts (2010), Dennis Keefe (2011), Peter Baláž (2012), Mark Fettes (2013), Mireille Grosjean (2014), Chuck Smith (2015), Stefan MacGill (2016) kaj Trezoro Huang Yinbao (2017).

En 2018 la elektado de la Esperantisto de la Jaro okazis por la 21a fojo. Ĉi-jare 18 kandidatigantoj proponis 22 kandidatojn, al kiuj 17 elektantoj jene donis siajn voĉojn:

Hori Jasuo — 11 voĉoj

Halina Gorecka — 5 voĉoj

Carlo Minnaja — 4 voĉoj

Peter Baláž — 3 voĉoj

Kvar kandidatoj ricevis po du voĉojn, tri kandidatoj ricevis po unu voĉon.

Hori Jasuo, 77-jara



universitata instruisto el Japanio, eksa estrarano de Japana Esperanto-Instituto (1993–2014) kaj UEA (2007–2010), redaktoro de La Revuo Orienta kaj poste de Esperanto en Azio, prezidanto de Komisiono pri Azia Esperanto-Movado (KAEM) en la jaroj 2001–2006. Li estas elektita pro la lanĉo kaj daŭra funkciigo de la populara legoprojekto “Esperanto-Sumoo”, kiu en novembro 2018 atingis la 55an sesion kun pli ol 300 legemuloj el 33 landoj, kaj pro la regula verkado kaj eldonado de la esearo Raportoj el Japanio, kies 21a volumo aperis ĉi-jare ĉe lia eldonejo Horizonte.

Gratulon al la Esperantisto de la Jaro 2018, Hori Jasuo!

Paweł Fischer-Kotowski

sekretario

Elektokomisiono de La Esperantisto de la Jaro 2018

-- Proponantoj

Marija Beloŝević (Kroatio): vic-prezidantino de IKUE

Marek Blahuš (Ĉeĥio): eksestrarano de E@I,

vikimediano, komputila lingvisto

Renato Corsetti (Britio): eksprezidanto de UEA

István Ertl (Luksemburgio): tradukisto ĉe Eŭropa Revizora Kortumo

Edmund Grimley Evans (Britio): eksprezidanto de EAB

Maritza Gutiérrez González (Kubo): estro de la Esperanto-redakcio de Radio Havano

Dafydd ab Iago (Belgio): eksdirektoro de la Brusela Komunikadcentro de EEU

> 30

Ŝercoj



Du knaboj eniris apotekon, elektis skatolon da virinaj higienaj kusenetoj kaj iris al la kaso. La apotekisto demandis la pli maljuna knabo:

- Filo mia, kiom vi aĝas?
- Mi havas ok jarojn.
- Ĉu vi scias, al kio ili utilas?
- Ne precize, sed ili ja ne estas por mi. Ili estas por li. Li estas mia frato. Li havas kvar jarojn. La apotekisto ridetis.
- Ho! Ĉu vere?
- Jes. Ni vidis televide, ke uzante ĉi tiujn aĵojn, oni povas naĝi, tenisi kaj bicikli. Ĝis nun li ne povis fari ĉi tiujn sportojn.

Ĉino eniris trinkejon, eksidis apud alia viro kaj komencis drinki. La viro diris :

- "Kiun luktosportojn vi konas, ĉu kungfuon, ĉu ĵuĵicuon aŭ karateon?"
- La ĉino kolere:
- "Kial vi damne demandas tion al mi, ĉu ĉar mi estas ĉino?"
- "Ne, ĉar vi trinkas mian damnan bieron!"



Demandas viro al rabeno:

- Mi volas vivi eterne, kion mi faru?

Respondas la rabeno:

- Edziĝu!
- Ĉu tiam mi vivos eterne?
- Ne, sed la deziro malaperos.

Krucvortenigmo

-- el Semajno de Enigmoj



HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Kabo de ___ Espero estas en Sud-Afriko; 5. En bela maniero; 7. Ne kotas ___ en sia nesto; 8. Ne ___ besto en sia nesto; 9. Elektre ŝargita formo de molekulo.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)



2. Plenumoj de ies volo aŭ ordono; 3. Ne kotas besto en sia ___ ; 4. Grandan en vertikala; 6. Diino de matena ĉielruĝo; 7. Simbolo por berkelio je kemio.

HORIZONTALAJ DIFINOJ (→)

1. Superu malamikon en batalo!; 6. Estu kiel ___ ; 7. Konsonantoj de unito; 8. L ; 9. Muzikĝenro karakterizata de larĝa uzo de improvizado; 11. Bongustega molusko.

VERTIKALAJ DIFINOJ (↓)

1. ___ estas plado manĝita malvarme; 2. Venĝo ___ plado manĝita malvarme; 3. Konsonantoj de noto; 4. Tipografoj utiligas ___-mastrumajn sistemojn; 5. Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko; 10. Konsonantoj de azoto.



(La solvo de la krucvortenigmo troviĝas en la antaŭlasta paĝo)

Fonto: Semajno de Enigmoj #3 <http://www.semajnodeenigmoj.com>

LA AŬTUNAJ MUŜOJ (1931)

(daŭrigata)

"Manĝu, trinku, kara mia! Mi prenis por vi botelon da vino en la kelo, kaj antaŭe plaĉis al vi terpomoj kuiritaj sub la braĝo."

"De tiam tiu gusto ne plu akompanas min", li ridante diris. "Mi tamen dankas, oldulino mia!"

Noktiĝis. Li eklumigis kandelon kaj metis ĝin sur angulon de la tablo. La flamo brulis, rekta kaj travidebla en la kvietaj noktoj... Kia silento!...

Li demandis:

"Njanjuŝka? Kial vi ne sekvis miajn gepatrojn?"

"Nu, necesis, ke iu restu por gardi la domon."

"Ĉu tion vi kredas? " li diris kun iu melankolia ironio, "kaj por kiu, Dio mia?"

Ili silentis. Li plu demandis:

"Ĉu vi ne volus iri kun ili?"

"Mi iros, se ili vokos min. Mi eltrovos la vojon; neniam mi estis mallerta nek stulta, danke al Dio!... Sed kio okazos pri la domo?"

Ŝi subite interrompis sin kaj mallaŭte diris:

"Aŭskultu!"

Malsupre, iu frapis la pordon.

Ili ambaŭ rapidege stariĝis.

"Kaŝu vin, kaŝu vin je Dio, Jurij!..."

Jurij proksimiĝis al la fenestro, singarde rigardis eksteren.

La luno jam leviĝis.

Li rekonis la knabon strarantan meze de la aleo. Tiu ĉi retroiris de kelkaj paŝoj kaj vokis:

"Jurij Nikolajeviĉ!... Estas mi, Ignat!..."

Li estis juna koĉero edukita en la domo de la familio Karin. Jurij ludadis kun li en sia infanaĝo. Li estis tiu, kiu kantis, sin akompanante per tirharmoniko, dum la someraj noktoj, en la parko.

"Se li volas malutili al mi", abrupte pensis Jurij, "ke ĉio iru al diablo kaj ankaŭ mi!..."

Li klinis sin tra la fenestro kaj kriis:

"Venu supren, knabo!..."

"Mi ne povas... La pordo estas barita!..."

"Malsupreniru por malfermi al li, Njanja*. Li estas sola..."

Ŝi flustris:

"Kion vi faris, kompatindulo?"

Li lace mangestis.

"Okazos, kio devos okazi... Krom tio, li vidis min!... Nu, iru malfermi, oldulino mia!"

Ŝi daŭre staris, senmova, tremanta, silenta.

Li ekiris al la pordo. Ŝi haltis lin, kun la sango subite reveninta al ŝiaj vangoj.

"Kion vi faras? Ne vi devas iri malfermi al koĉero. Atendu min!"

Li dolĉe levis la ŝultrojn kaj residiĝis.

Kiam ŝi revenis sekvata de Ignat, li stariĝis kaj alpaŝis antaŭ ilin.

"Saluton. Mi ĝojas vidi vin."

"Ankaŭ mi, Jurij Nikolajeviĉ", ridetante diris la junulo. Li havis bonan dikan rozkoloran vizaĝon.

"Ĉu vi sate manĝis?"

"Dio helpis min, barin..."

"Ĉu vi daŭre ludas akordionon kiel antaŭe?"

"Foje okazas..."

"Mi ankoraŭ aŭdos vin... Mi restos ĉi tie kelkan tempon..."

Ignat ne respondis. Li plu ridetis, montrante siajn larĝajn brilajn dentojn.

"Ĉu vi volas ion trinki? Alportu unu glason, Tatjana."

La maljuna virino malplaĉe obeis.

La knabo trinkis.

"Je via bona sano, Jurij Nikolajeviĉ!"

Ili silentis. Tatjana Ivanovna alproksimiĝis:

"Nu, bone. Foriru nun. La juna barin estas laca."

"Tamen necesus, ke vi venu kun mi al la vilaĝo, Jurij Nikolajeviĉ..."

"Ĉu?... Kial?" murmuris Jurij per voĉo nevole malfortiĝanta. "Kial do, knabo?"

"Necesas."

(daŭrigota)

tradukis MIKELO (Michel Dereyger), el Francio



Mi tralegis ege interesan libron de juna nederlanda aŭtoro Rutger Bregman „Utopio por realistoj“. Mi ne memoras kiom da tempo pasis de la lasta fojo kiam mi legis iun libron dufoje. Chi tiu tiom valoras ke mi decidis relegi ĝin kaj noti ĉefpunktojn de ĉiuj 10 ĉapitroj por povi poste reuzi ilin. Iam kiam mi havos tempon, mi skribos pri la libro mem pli detale, sed nun mi resumas nur la plej gravajn konstatojn de ĉi tiu tre valora verko.

La aŭtoro montras per atentigo al tre multaj eksperimentoj, kiujn oni ĝis nun prisilentis, la malĝustecon de argumentoj kontraŭ la ideo pri enkonduko de Universala deviga enspezo. Kaj li montras argumente kiel la aŭtomateco kaj robotiko nepre devigos la registarojn pro ĉiam malpli solvebla problemego de senlaboreco enkonduki jam de longe profetatan gravan malplilongigon de la laborsemajno (15 aŭ 20 horojn) kaj montras ankaŭ ke tio neniel rezultos per maldiligenteco kaj neemo labori – eĉ kontraŭe. Li tre bone argumentas pri tio ke grupoj de homoj el la plej maliĉaj tavoloj plej efike eltiris sin el tiu stato se ili simple ricevis monon kiel helpon (ne krediton, ne sociajn servojn). Inter la plej lastaj kazoj estas eksperimento en Londono kun 13 senloĝuloj. Kiam oni decidis helpi ilin per eta mona donaco ĉiumonate, tiuj homoj tute ne elspezis tion por alkoholo, drogoj aŭ negravaĵoj. Ili mem sciis kio por ili estas prioritato. Ili aĉetis nur vestaĵojn kaj manĝojn sed la plej grandan parton de la mono ŝparis por komenci ion fari kaj perlabori kaj reigi normalaj homoj en la socio, kio sukcesis por 11 el ili jam post unu jaro. La urbo ŝparis multan monon, ĉar tio kostis al ili multe malpli ol pagi al socialaj institucioj kiuj disponigas al ili litojn en vintro, kaj al institucioj kiuj manĝigas ilin. Sekve lia konkludo estas ke la mondo devos tre baldaŭ enkonduki mallongegan labortempon kaj universalan bazan enspezon por ĉiu civitano de la naskiĝo ĝis la morto.

Mi trovas tion vere ĝusta pensmaniero por la revolucia socio kiun oni devas enkonduki tre baldaŭ kaj ke la titolo de la libro estas tre prava: Tio estas utopio nun, sed por realistoj, ĉar ĝi nepre devos okazi.

Afero kiun mi ŝatus tuŝi ĉi tie estas: Kio poste? Pri tio li diras nenion ĉar en iu loko li diras ke tiel oni savos kapitalismon forigante kapitalistojn.

Laŭ mi tio estas vere nepra interfazo inter la nuna neoliberalo kapitalismo kaj tio kio sekvas.

Do, kio poste?

Laŭ mi, rezulte de tiu fazo en kiu neniu estos devigata labori kiel dungito por salajto eĉ se nur 15 horojn semajne. Homoj kiuj okupiĝas pri laboro kiun ili

ŝatas, akceptos tion kaj plu laboros ne ĉefe por gajni pli da mono, sed por plu ĝui en la laboro kaj ties rezultoj. Sed plej multaj aliaj – kiuj nuntempe suferas pro siaj ĉefoj, timo ne havi enspezojn kaj granda streso preferos havi tiun universalan bazan enspezon kaj liberiĝi de la sufero. El tio sekvas ke la afero rapidege devigos kapitalistojn oferti humanajn laborkondiĉojn kaj kompreneble multe pli grandan salajron kaj tio devigos ekspluatantojn bankroti. Kompreneble la homoj kun nur UBE ne restos senlaboraj, ĉar ja neniu ŝatas la tutan vivon fari nenion. Ili komencos okupiĝi pli kvalite kaj longdaŭre pri siaj hobiaj kaj kreados aferojn kiujn ili bone konas. Eble kelkaj laboros eĉ pli longe ol ĝis nun.

Laŭ mi estiĝos iom da kaoso ĉar dum certa tempo mankos iuj servoj (ne la varoj – kiuj plu estos produktataj de robotoj). Mankos ekz. medicinaj flegistinoj, flegistoj en maljunulaj hejmoj ktp, se oni mallongigos la tempon je kvarono, sed baldaŭ malaperos senlaboreco ĉar tio kvarobligos postulon je laborlokoj. Homoj kiuj okupiĝas hodie pri multegaj aferoj plu kreados kreativajn novajn ideojn kaj bezonataĵojn (iuj okupiĝos pri ĝardenumado kaj kreos novajn metodojn en plantoproduktado, programistoj jam nuntempe kreas amason da senpagaj servoj kiuj daŭre pliefikiĝos la vivon ktp.)

Kien tio kondukas? Al stato en kiu detruigiĝas la kapitalismo. Ĉar tre baldaŭ post la fazo de UBE la laboron kaj socion ne plu gvidos homoj kun kapitalo kaj mono kiu faras ilin potencaj. Kun la malapero de labortempo, malaperos la pagata laboro, sekve ankaŭ mono kaj maleperos la kapitalo. Sekve malaperos la kapitalismo. Kio estos daŭrigo: sistemo en kiu la homoj konkuros ne per mono sed per scio kaj scio decidus pri potenco pri kiu disponas unuopulo. Homoj kun la plej granda scio estos pri tio taksataj per komputilaj punktoj kaj ne per mono. Ju pli da punktoj, des pli da socia pozicio.

Kiel ni nomu tiun sistemon: mi ne scias. Eble sciismo.

verkis **Zlatko Tišljar**, el Kroatio

Fonto: <http://www.ipernity.com/blog/pajo.zlatko/4710742?t=93964&c=1&s=editlatko>



La unuaj bildoj, kiujn InSight sendis de la surfaco de Marso montris tedan dezerton, sed tio nur feliĉigis sciencistojn. La misio, kiu rezultis de kunlaboroj inter la Usona spacagentejo NASA kaj diversaj Eŭropaj organizoj en interalie Francio kaj Germanio, celas bori en la grundon kaj por tio, la grundo estu plata kaj mola.



La unua bildo de la Marsa surfaco. La malhelaj makuloj estas pro la travidebla lenskovrilo, kiu ankoraŭ kovris la kameraon.



La unua "Memfoto" de InSight. Videblas interalie la robota brako en la mezo de la bildo.

Kontraste al misioj kiel Curiosity kaj Opportunity, InSight ne havas radojn. Pro tio ĝi ne povas moviĝi trans la surfaco kaj devas sursurfaciĝi ĝustaloke la unuan fojon. La regiono Elysium Planitia estis elektita por tiu celo, pro tio ke ĝi estas plata kaj ne havas multajn grandajn rokojn. Aldone, la regiono estas tiom malalta ke la atmosfero estas sufiĉe densa kaj la proksimeco al la ekvatoro garantias sufiĉe da sunlumo por akiri energion. Malgraŭ tio, la surmarsigo ankoraŭ estis sufiĉe nervoziga, pro tio ke Marso ne estas konata kiel facila loko por sursurfaciĝoj. Ĝia atmosfero estas tiom densa ke oni devas protekti la kosmoŝipon kontraŭ la varmiĝo kiam ĝi trafas ĝin, sed ĝi ne estas sufiĉe densa por uzi nur paraŝutojn. Fakte, malpli ol duono de la sondiloj, kiuj provis surmarsigi ankaŭ sukcesis. La sukcesplena surmarsigo okazis la 26an de novembro kaj entute daŭris ĉirkaŭ 6 minutoj, sed se ĝi estus fuŝita, la tuta misio estus ruinata. Unue, InSight troviĝis en ujo kun dika kontraŭvarma ŝildo. Dum la unua fazo de la surmarsigo, ĝi iris tiom rapide ke paraŝuto tuj rompiĝus. Pro tio, ĝi nur uzis la froton de la atmosfero kontraŭ la kontraŭvarma ŝildo por malrapidiĝi. Pro tiu granda froto, la temperaturo altiĝis ĝis 1500°C, sed ene, kie InSight troviĝis, estis ĉirkaŭ

ĉambra temperaturo. Dum la dua fazo, la sondilo moviĝis sufiĉe rapide por ellasi la paraŝuton. Tiu eĉ pli malrapidiĝis ĝin ĝis la lasta paŝo. La kontraŭvarma ŝildo estis forĵetata de la ujo, tiel ke la kruroj de InSight eliris el la ujo. Finfine, ankaŭ la resto de la ujo kaj la paraŝuto estis malkonektitaj, post kio InSight libere falis tra la atmosfero. Per 12 etaj raketoj, ĝi sukcesis malrapidiĝi tiom, ke la kruroj povis elteni la ŝokon. Tiel ĝi sekure iris de 5,5km/s al 0km/s en nur 6 minutoj. Nun, NASA havas kontakton kun InSight kaj ĉio ŝajnas bona. La ĉirkaŭaĵoj aspektas taŭgaj kaj la roboto havas nun deklivon de ĉirkaŭ 4°. Tio bonas, ĉar ĝi estas dezajnita por funkcii kun deklivo ĝis 15°. Nun estas tempo por ŝarĝi la bateriojn kaj prepari la sciencajn instrumentojn kaj jam dum la unua labortago InSight havis rekordon. Neniu misio sur la surfaco de Marso akiris tiom da energio tiom rapide antaŭe.




La vojo de la eniro en la atmosferon al la surfaco

La dezajnintoj de InSight estas scivolemaj pri la eno de la planedo. Antaŭaj misioj nur esploris la surfacon, sed per rigardi pli profunde, oni esperas lerni pli pri la formado de rokaj planedoj. Por tio, ĝi havas du elstarajn instrumentojn. La unua estas seismografo. Ankaŭ la Vikingaj misioj de la sepdekaj jaroj kunportis seismografojn, sed pro tio ke ili ne rekte tuŝis la surfacon, ili nur mezuris bruon, ĉefe de la vento. Por solvi tiun problemon, InSight kunportis longan robotan brakon, per kiu ĝi povas preni la seismografon kaj meti ĝin sur la surfacon. Aldone, la seismografo ricevos kovrilon por ke ĝi ne estu ĝenata de la vetero. Marstremoj ne havas la saman kaŭzon kiel tertremoj. Marso havas fiksitan kruston sen platotektoniko. Malgraŭ tio, tremoj povus esti kaŭzataj

de, ekzemple, magmo, kiu premas kontraŭ la krusto, aŭ eĉ meteorŝtonoj, kiuj trafas la surfacon. Tiuj tremoj estas tre malfortaj, sed ili devus esti mezureblaj. Pro tio ke ili trairis la planedon, ili kunportas informojn pri la ena strukturo de la planedo. Tio estas interesa, ĉar Marso kreiĝis sammaniere kiel la Tero, sed ne konstante estas rekreata de geologia aktiveco. Ĝi povas havi spurojn, kiuj jam dumlonge malaperis ĉi tie.


La dua ĉefinstrumento ankaŭ estos metata sur la surfaco per la robota brako. Temas pri borilo, kiu povas fosi ĝis 5m profunde. Ĝi havas la kromnomon "Talpo" kaj same kiel vera talpo havas tre senteman voston. Tiu vosto estas longa drato, ligita al InSight, kiu plenas je varmosensiloj. Ĉiujn 50cm, la Talpo elsendas pulson da varmo, kiu poste estas detektata de la sensiloj. Per mezuri kiom rapide la varmo disiĝas, oni povas diveni kiom bone la grundo tralastas varmon kaj el kia materialo ĝi konsistas. La celo de la Talpo estas mezuri kiom da varmo eskapas la planedon kaj kio la fonto de tiu varmo povas esti. Per fari tion profunde, oni ankaŭ garantias ke la mezuroj ne estas influataj de veteraj influoj sur la surfaco. InSight do ne moviĝas kiel la pli famaj Marsmisioj, sed ĝi aŭskultos kaj sentos pli profunde ol ajna alia misio.



InSight kun ĉiuj el siaj instrumentoj

Dum sia longa vojaĝo, InSight ne estis sola. Ĝi kunportis du etajn kubsatelitojn, el kiuj konsistas la MarCO misio. La du etaj satelitoj, kiuj ne pli grandas ol 37x25x12cm, estas ankaŭ konataj laŭ siaj kromnomoj "WALL-E" kaj "EVE", de la Disney-filmo WALL-E, kiu temas pri eta roboto, kiu iras en la kosmon. Kvankam la du satelitoj ne kunportis verajn sciencajn instrumentojn, ili estis esenca parto de la misio. Per iliaj kameraoj, ili povis sekvi la surmarsiaĝon de la ĉefa sondilo kaj tuj sendi la datumojn al la Tero. Tio estas grava, pro tio ke la inĝenieroj de NASA povu lerni de la surteriĝo por estontece plibonigi la teĥnologion. Aldone, la eksperimentaj satelitoj montras ke oni povas uzi kubsatelitojn dum longdistancaj misioj, kio antaŭe neniam estis provita. Laste, ili faris ankaŭ

eksperimentojn. Malgraŭ tio ke ili ne kunportis sciencajn instrumentojn, oni povis kreeme uzi la instrumentojn, kiujn ili ja havis. Dum sia preterflugo, unu el la satelitoj sendis signalojn al la Tero tra la atmosfero de marso. Surtere, oni povis uzi tiujn signalojn por eltrovi kiel la atmosfero interagas kun la radiado. Tiel oni povas mezuri kiom densa la atmosfero estas kaj eĉ iomete el kiuj ĥemiaĵoj ĝi konsistas. Komprenoble tiu eksperimento ne estas tiom impona kiel tiuj, kiujn faros la ĉefa sondilo, sed ĝi ja montras ke kubsatelitoj povas esti uzataj por eksperimentado dum longdistancaj misioj. MarCO montras ke, kvankam ili sendube ne prenos la lokon de klasikaj misioj, kubsatelitoj havas la potencon de ludi gravan rolon en estontecaj misioj kiel kunuloj.



Modeloj de la MarCO satelitoj faldite kaj disfaldite

Ĉi-momente, InSight ankoraŭ komfortiĝas en sia nova hejmo kaj serĉas belajn lokojn por meti siajn aferojn, sed la venonta Marsa jaro estas promesplena. Estas eksciiĝa ke InSight sekure alvenis, sed eĉ pli ke novaj malkovroj estas tuj malantaŭ la horizonto. Sukceson, InSight!

Fonto: <https://scivolemo.wordpress.com/2018/12/05/la-dangera-vojo-de-insight/>

Kastelo Greziljono

Kulturdomo de Esperanto - Kastelo Greziljono

adreso: Château de Grésillon, F-49150 Baugé en Anjou
kontakto: kastelo@gresillon.org, +33 2 41 89 10 34

Nia programo en 2019

Ĥora-korusa kantado aŭ NaturArto : 12-16.aprilo
Intensaj kursoj kaj KER-ekzamenoj aŭ piedmigrado: 26.apr-4.maj
Maratona E-kurso kaj interŝanĝoj de scioj: 8-18.julio
Festa Semajno por infanoj-familioj kaj popoldancoj: 6-16.aŭg
Aŭtuna staĝo : 26.oktobro - 3.novembro

Vidu la agendon rete en : <http://gresillon.org/agendo>

ESPERANTO

Oficiala organo de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

JARA ABONO

Ordinara eldono 5.— Frankoj
 Luksa eldono 6.25 Frankoj
 Sviza poŝtebla konto 1.524.— Oni akceptas nur tutajn abonojn
 La abonoj komenciĝas de la 1^a de ĉiu monato

REKLAMO

Reklamo (1 linio aŭ ĝia spaco) 0.50 Frankoj
 Anonceto (1 linio: 10 vortoj) 0.40 Frankoj
 Korespondado (1 enskribo) 0.50 Frankoj
 Rabatoj: 3 impresoj 10%; 12 impresoj 25%.

Direktoro: HECTOR HODLER — Redakto & Administrejo: 10, rue de la Bourse, GENÈVE (Svisujo)

TESTO. — Nuntempoj: *La desinjekto de la cerbo*, D-ro Alfred H. Fried. — Socia vivo: *Pri Litovujo*, Iv. H. Krestanoff.
 — *La japana cirilo*, Bileux. — *Falsado de antaŭaĵoj*, W. Kampflert. — Notoj: — Literaturo: *Sinjorino Mac Williams kaj la Japano*,
 Mark Twain. — Esperantismo: *Esperantismo kaj novaj ŝtatoj*, Ed. Privat. — *Esperanto-Kongresoj*. — *Kroniko*. — *Diversaĵoj*. —

Antaŭ cent jaroj, kiam ĝis la fino de la Granda Milito restis nur kelkaj semajnoj, en la septembra-oktobra numero de la revuo Esperanto aperis artikolo de Edmond Privat, dediĉita al novaj ŝtatoj, aperintaj en la teritorio de Ruslanda Imperio, kiu ĉesis ekzisti en 1917. Privat esperis, ke post nacia liberiĝo venos internacia refratiĝo, sed tio ne realiĝis...



Edmond Privat

Eble la ĉefa rezultato de la milito estos la renaskiĝo de diversaj ŝtatoj en orienta Eŭropo precize en tiu parto de l' mondo, kie aperis Esperanto. Preskaŭ neniu en Okcidento komprenis kaj antaŭvidis, ke fatale tiu granda skuo devos inciti la multajn gentojn de l' rusa Imperio barakti por regajni ilian antikvan sendependecon. Eĉ hodiaŭ, ekzistas multaj personoj, kiuj volonte diras pri Ukrainio aŭ Litovujo, ke ili ne ekzistas, kaj ĉiu povas vidi, ke politikistoj neantaŭvidemaj laboras ankoraŭ por restarigo de vasta unu Rusujo.

Estas vere, ke tre malmultaj homoj en Okcidento ion aŭdis antaŭ la milito pri la diversaj gentoj, kiuj loĝas sur la grandega teritorio regita de l' caroj. Eĉ en lernejoj, francaj, anglaj kaj germanaj, infanoj ricevis iluziojn pri unueco de l' orienta giganta ŝtato. Inter tiuj, kiuj ne partoprenis tian eraron kaj estis iom pli bone informitaj pri la vera stato de tiuj landoj inter Balta kaj Nigra maroj, oni povas kalkuli la Esperantistojn. Efektive, la tuta predikado de nia dolore bedaŭrata Majstro, D-ro Zamenhof, montris al ni ne nur la

diversecon de gentoj pola, hebrea, ukraina, litova, leta, esta, fina, blank-rusa, tatara, georgia, armena, kirgisa, k. t. p., sed ankaŭ la disputojn kaj ofte malamon, kiuj ekzistas inter ili. Aŭdante la genian parolon de l' amata mortinto estis facile kompreni, kiel fervore li deziris pacigon inter tiuj popoloj.

Cetere listoj de diverslingvaj Esperanto-lerolibroj, legado de naciaj Esperantaj gazetoj kiel "Pola Esperantisto", "Ukraina Stelo", k. t.

p., korespondado kun samideanoj de tiuj regionoj konigis al ni la ekziston de tiuj nacioj premataj sub fremda regado.

Kiu el ni ne memoras ankaŭ la indignan proteston de finlanda aŭ pola delegitoj ĉar sekretario de kongreso nia forgesis kalkuli ilian nacion sur la listo de l' parolantoj ĉe l' malferma kunsido?

Tiel, en nia propra Esperantista rondo familia, ni lernis konatiĝi kun tiuj malfeliĉaj popoloj, kiuj ne ĝuas liberan vivadon kaj revis pri malproksima tago de nacia liberiĝo metante sian esperon en la sama stelo, kiu simbolas por ni la tempon de homa refratiĝo. Kun intereso, kun simpatio kaj ankaŭ eble kun iom da skeptika dubo ni sekvis ilian klopodadon por defendi la rajton de iliaj nacioj kaj memori la mondon pri ilia ekzisto. Ĉu kelkaj el la plej belaj tradukaĵoj aperintaj en nia lingvo ne estas efektive literaturaĵoj el tiuj lingvoj, kiujn imperia cenzuro malpermesis en oficialaj lernejoj kvazaŭ oni povus tiel elradikigi el koro de l' homoj la karan hejman parolon lernitan sur genuoj de patrino?

Hodiaŭ, karaj fratoj, ukrainaj, litovaj kaj polaj, vi preskaŭ atingis la unuan celon, la horo de l' liberiĝo subite jen eksonis por vi kiel hela sonorilo inter la dolora bruado de l' milito kaj la frakaso de l' ruiniĝanta imperio. Kun vi ni ĝojas pri via nacia renaskiĝo kaj ni tutkore esperas, ke vi sukcesos starigi viajn ŝtatojn en plena sendependeco je potencaj najbaroj. Se vere povas lumiĝi super viaj kapoj la tiom esperita tago de liberiĝo, al vi el malproksimo ni sendas tutkoran bondeziron kun frata saluto kaj al vi, kiuj restas ankoraŭ premataj ni sendas esperan senton. Sed la duan, nian komunan celon ni devas nun ĉiuj atingi. Post nacia liberiĝo devos iam veni internacia refratiĝo. Kiel ankoraŭ malproksima ŝajnas tiu tempo! Eĉ inter apenaŭ starigitaj novaj ŝtatoj jam komenciĝas akraj disputoj pri landlimoj kaj teritorio. Imperialismo, avideco kaj maltoleremo jam venenas la sunleviĝon en ĉielo de junaj popoloj.

Post la milito sur la ruinoj de la Aŭstria-Hungaria, Germana kaj Ruslanda imperioj fondiĝis pluraj novaj

ŝtatoj.



Al tiaj tendencoj la Esperantistoj devas energie kontraŭbatali. Ni ŝiru la verdan stelon de nia brusto se ni konsentas akcepti patriotismon bazitan sur malamo! Pli ol unu fervora samideano subite fariĝis influa viro kaj politikisto en nova ŝtato de orienta Eŭropo. Ilia Esperantismo kaj la memoro de nia Majstro trudas al tiaj homoj gravan respondecon kaj tre klaran devon. Ĉiuj ni fidas, ke ili donos tutan sian forton por praktike realigi la principojn de Zamenhof en la konstruado de siaj ŝtatoj.

Neniam, kaj speciale ne en orienta Eŭropo, povos landlimoj precipe apartigi la gentojn laŭ lingvo kaj religio. Ĉiam restos polaj kaj hebreaj urboj meze de ukrainaj aŭ litovaj kamparoj. Malsaman lingvon kaj diversan religion havos eterne vilaĝanoj kaj urbanoj de vastaj regionoj. Kiel starigi pacan kunvivadon inter ĉiuj, se ne per plena toleremo kaj per reciproka respekto de ĉiuj gentaj rajtoj. Kiam kaj kie pli profete taŭgas la tuta homa instruado de Zamenhof?

En Svisujo neŭtrala kaj sen teritoria ambicio ni starigis Orientan Komisionon por interkonatiĝo kaj studado de komunaj demandoj inter Poloj, Ukrainoj, Litovoj, Letoj, k. t. p. Ni tutkore dezirus, ke en tiuj landoj disvastiĝu pli kaj pli la ideoj de Esperantismo, t. e. la tendencoj al internacia kunfederiĝo kaj al neŭtraleco. Kompreneble nenio pli helpas tian rezulton ol propagando de nia lingvo mem. Tial duoble fervore ĉiuj Esperantistoj en orienta Eŭropo laboru por enkonduki Esperanton en la ŝtataj lernejoj. Neniam antaŭe estis la ŝancoj tiel vastaj kaj la eblaj rezultatoj tiel gravaj por tuta homaro.

Edmond Privat

Fonto: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2018/10/privat>

- 23 >** Aleksander Korĵenkov (Ruslando): ĵurnalisto kaj verkisto
Lee Jungkee (Koreio): direktoro de Seula Esperanto-Kulturcentro
Vinko Markovo (Francio): prezidanto de la Plenum-Komitato de SAT
Valentin Melnikov (Ruslando): poeto, ĵurnalisto, tradukanto
Barbara Pietrzak (Pollando): radioĵurnalisto, redaktoro
James Rezende Piton (Brazilo): konsilanto de BEL, aktivulo de Skolta E-Ligo
Chuck Smith (Usono/Germanio): kunfondinto kaj teknikestro de Amikum
Franciska Toubale (Aŭstralio): kunlaboranto de la radio 3ZZZ
Sibayama Zyun'iti (Japanio): estrarano de JEI, ĉefredaktoro de La Revuo Orienta
Paulo Sergio Viana (Brazilo): tradukanto kaj preleganto
Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio): prezidanto de IKEF, direktoro de Ĉina Esperanto-libroservo, komitatano de ĈEL
-- **Elektantoj**
Peter Baláž (Slovakio): kunordiganto de E@I
Petr Chrdle (Ĉeĥio): posedanto de la eldonejo KAVA-PECH
Agneta Emanuelsson (Svedio): prezidanto de ILEI-SE
Mireille Grosjean (Svislando): prezidanto de ILEI

- Anna Jausions (Francio): eksprezidantino de OSIEK
Reza Kheir-khah (Tajvano): redaktoro de Formoza Folio
Gbeglo Koffi (Togolando): administranto de la Afrika Centro Esperantista
Ilona Koutny (Pollando): gvidanto de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM
Katalin Kováts (Nederlando): lingvisto, metodologo, redaktoro de edukado.net
Liu Haitao (Ĉinio): profesoro pri (inter)lingvistiko
Trezoro Huang Yinbao (Ĉinio): ĉefredaktoro de Unesko-Kuriero, direktoro de Esperanto-Centro Ora Ponto
Vasil Kadifeli (Turkio): tradukanto, eldonanto de Turka Stelo
Tahira Masako (Japanio): kunlaboranto de KAEM
Sergio Pokrovskij (Ruslando): sciencisto, tradukanto, eseisto
Anna Ritamäki-Sjöstrand (Finnlando): prezidanto de kooperativo Esperanto-Gastigejo en Lesjöfors
Roland Rotsaert (Belgio): redaktoro de Monato pri ekonomio
Syōzi Keiko (Japanio): revizoro de JEI, eldonanto ĉe Libroteko Tokio

Sekretario

Paweł Fischer-Kotowski (Pollando)

Fonto: La Balta Ondo <http://sezonoj.ru/2018/12/hori>

Tiu subprefekto vere estas la perlo el la mandarenoj, la escepto, kiu konfirmas la regulon, ĉar neniam oni vidis lin ricevi la plej etan koruptmonon. Tial, kiam li atingis la emeritan aĝon, la dankema loĝantaro decidis oferedoni al li unu suveniron indan je lia nobla virto.

Ne kuraĝante sin turni rekte al la mandareno, la delegitoj petis lian edzinon konigi al ili, kio povus plaĉi al ilia subprefekto.

- Tial ke vi insistas, diris Sinjorino subprefektedzino, unu malgranda kuriozaĵo tute taŭgas.

- Bona ideo! ... ĥore ekkriis la delegitoj. Ĉu vi povus, Sinjorino, diri al ni, en kia jaro S-ro Granda Mandareno estis naskita?

- En la jaro de la Muso¹... Kial do?

- Nu! Ni oferedonos al li unu muson el masiva arĝento je natura grandeco.

Sinjorino Subprefektedzino ricevis la donacon, aŭdacante diri nenion al sia edzo.

Kelkajn jarojn pli poste, nia mandareno travivis

malfacilajn tagojn. Lia edzino distranĉis la muson en pecetojn, kiujn ŝi vendis unu post la alia por kovri la familiajn elspezojn. Malkovrinte baldaŭ la aferon, Sinjoro ekmiras kaj demandis ŝin pri la deveno de tiu arĝenta muso. Tremetante, la edzino rakontis al li la historion kaj volonte atendis de li fortan indignon. Sed li simple diris:

- Mia povra karulino! Kial diri la veron? Vi devus pliĝuste respondi, ke mi naskiĝis en la jaro de la Bubalo!

Tiel agus ĉia mandareno inda je tiu nomo.

Noto

¹ La lunkalendaro dividas la tempon en 12-jarajn ciklojn. Ĉiu jaro estas simboligita per unu animalo, nome Muson, Bubalon, Tigron, Katon, Drakon, Serponton, Ĉevalon, Kapron, Simion, Kokon, Hundon kaj Porkon.


Eltiraĵo el **Ridi Vjetname**, eldonita en 1981 de Fremdlingva Eldonejo.

Fonto: <http://www.kunlaboro.pro.br/esperanto/ridi-vjetname/bona-lernantino/>

Esperantaj vortoj por la 14-a de februaro



Amletero



Ĉokolado



Donaco



Fajro



Floroj



Kiso



Koro



Lipoj



Lipruĝo



Ringo



Rozo



Vino

Vortareto

- bubalo - azia specio de bovo, kun longaj kornoj, uzata ankaŭ kiel dombesto (Bos bubalis).
- delegito - persono, kiun iu delegis.
- donaci - senkompense doni, kiel ateston de bonvolemo, amikeco, favoro ktp.
- mandareno - unu el la Ĉinoj, kiuj post ekzameniĝo apartenis al unu el la 9 klasoj de la ŝtatfunkciuloj.
- muso - malgranda mamulo el la ordo de ronĝuloj, kun longa, skvamkovrita vosto; kelkaj specioj faras malutilon en homaj loĝejoj.
- perlo - perfekta objekto aŭ persono.

Solvo de la krucvortenigmo

O	R	L	S	O
N	O	Z	V	Ĝ
O	T		L	N
S	O	T	S	E
U	K	N	E	V

O	N	O	J	
S	V	L	O	K
O	L	S	E	B
E	L	E	B	
	V	A	N	O



Stranga testamento

Irlanda riĉulo mortis en la jaro 1769. Notario kunvokis la heredontojn. Li komencis laŭtlegi: „... al mia bofratino la kvar malnovajn ŝtrumpojn sub mia matraco dekstre, al mia nevo Miĥaelo du neparajn ŝtrumpetojn kaj verdan noktan ĉapon; al leŭtenanto Johano Ŝtono unu bluan ŝtrumpon kun mia ruĝa mantelo; al mia kuzino Barbara malnovan boton kaj poŝon el ruĝa flanelo, al Anna mia mastrumistino mian difektitan akvokruĉon...”

La diversaj personoj ekkoleris, ne nur por seniluziigoj post esperoj, sed pro superflujaj humiligoj...

... ĝis Anna indigne piedbatis tiun difektitan kruĉon kaj el ĝi ekfalas ormoneroj. Tiam ĉiuj esploris kaj trovis, ke la ŝajne ofendaj objektoj estas plenaj de mono.

Dua stranga testamento

Franca dukino, kiu mortis en la jaro 1776, preskribis detale sian multekostan enterigan ceremonion. Inter aliaj ekscesoj ŝi ordonis, ke oni portu ŝian kadavron per solena procesio kvarcent kilometrojn al la enteriga loko, kun ĉiutaga diservo ĉe survoja haltejo kaj ducent torĉportantoj oficantaj tra la tuta vojo.

La dukino tamen testamentis tre bonajn mondonacojn kaj pensiojn al siaj geservantoj – sed sub kondiĉo, ke ĉiu loĝu aparte de ĉiuj aliaj, kaj ŝi detale preskribis la loĝlokojn.

Kial? Ĉar ŝi deziris ke ili ne klaĉu kune pri ŝi post ŝia morto!

"La (sin)mortigo" - rakonto de Colin Simmonds

el MEJ-Cirkulero 2/2001, Britio

"Do, gesinjoroj, bonvenon. Mi estas ĉefa medicina kontrol-esploristo de la urbo Trier. Mi estas ĉi tie por raporti pri miaj eltrovoj kaj konkludoj rilate al publika demando pri la morto de Sinjoro Haroldo Hazardo.

Kiel vi scias, la 23-an de marto pasintjare mi ekzamenis la kadavron de S-ro Hazardo kaj konkludis, ke li mortis pro kugletar-fusila vundo ĉe kapo. Tiu fakto estas nekontestebla. Mi havas ĉi tie kopion de la jura kaj nekropsia raportoj, kune kun la makabraj fotoj, se iu el vi deziras ekzameni ilin poste.

Tamen, la afero iom komplikiĝis pro la fakto, ke tuj antaŭ sia morto, S-ro Hazardo estis saltinta de supro de deketaĝa apartament-bloko kun celo al sinmortigo. Ankaŭ la kopio de la fina noto (kiu elokvene indikas lian senesperon) estas alkroĉita por via tralego.

Kiam li falis preter la naŭa etaĝo, lia vivo finiĝis per kugletar-fusila pafaro tra fenestro, kiu tuj mortigis lin.

Nek la pafinto, nek la sinmortigonto konsciis, ke sekur-reto estis instalita ĉe la nivelo de la oka etaĝo por protekti kelkajn fenestro-purigistojn, kaj ke pro tio S-ro Hazardo ne estus povinta efektiviĝi sian sinmortigon.



La juro informas nin, ke persono, kiu mortas celante al sinmortigo, estas konsiderata sukcesinto, eĉ kvankam la rimedo de forpaso eble ne kongruas kun la unua intenco. Se S-ro Hazardo estis pafita survoje al la certa morto naŭ etaĝojn pli sube, tio probable ne estus ŝanĝanta la mord-modelon de sinmortigo al murdo. Sed la fakto, ke lia celo de sinmortigo ne estus sukcesa, pensigis min, ke prava verdikto tamen devas esti murdo.

La ĉambro de la naŭa etaĝo, el kiu venis la kugletar-fusila pafaro, estas loĝita de maljunaj geedzoj. Ili daŭre kvereladis, kaj li minacis ŝin per pafilo. Li estis tiom ekscitita, ke kiam li premis la ĉanon, li maltrafis sian edzinon kaj la kugletoj trairis la fenestron, frapante S-ron Hazardon.

Nu, kiam oni celas mortigi personon "A", sed celante al tio mortigas personon „B“, oni kulpas pri murdo de persono „B“. Konfrontite al tiu imputo, la maljunulo kaj lia edzino insistis, ke ili ne konstatis, ke la pafilo estis ŝargita.

La maljunulo diris, ke estis longdaŭra kutimo minaci la edzinon per neŝargita pafilo. Li fakte ne intencis murdi ŝin; tial la mortigo de S-ro Hazardo ŝajnus akcidento. Tio estas, ĉar la pafilo estis nur hazarde ŝargita.

La esploro poste malkovris atestiton, kiu vidis la filon de la maljuna paro ŝarĝantan la pafilon proksimume ses semajnojn antaŭ la morta incidento. Riveligis, ke la maljunulino ĉesigis la financon subtenadon de sia filo kaj ke li, dezirante venĝon, kaj sciante pri la inklino de sia patro uzi la pafilon minace, ŝargis la pafilon atendante, ke la patro mortpafos la patrinon.

La afero nun temas pri la murdo de S-ro Hazardo fare de la filo. Estas fina elstara surprizo. Plua esplorado malkovris, ke la filo, kiu fakte estis Haroldo Hazardo, pli kaj pli senesperigis pro la malsukceso de sia plano okazigi morton de la patrino. Tial, la 23-an de marto li saltis desur la deketaĝa konstruaĵo kaj tuj mortis pro kugletar-fusila pafaro tra la fenestro en la naŭa etaĝo.

Konsiderante, ke li mem ŝargis la pafilon, mia raporto montros la verdikton 'sinmortigo'.

Ĉu demandoj?

Do, dankon pro via atento.“